

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosarno, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 32 (112)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1963

---

## MELBOURNE INVITES YOU TO THE 14th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

30 December, 1963, to 5 January, 1964.

Congress Fee: before 1 August, 1963: for A.E.A. members 25/-; for others 30/-; after 1 August, 1963: for A.E.A. members 30/-, for others, 35/-.

Make hotel reservations as early as possible as all Melbourne hotels are usually booked out at this time of the year. (£2 deposit.) Send your hotel reservations and Congress fees to: Congress Secretary, Box 2122T., Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Watch for further details!

## Australia Kroniko

● **HOBART:** La jara ĝenerala kunveno elektis la jenan estraron: Prez: S-ino A. Douglas; Vic-Prez: S-inoj W. Shankley kaj G. Cooper kaj S-ro J. Gibson (Launceston); Sekr.: S-ro G. Lancaster; Kasisto: S-ro G. Cooper.

La prezidantino menciis ke dum la pasinta jaro nia klubo aranĝis kursojn por komencantoj kaj progresintoj kaj gajnis kelkajn novajn anojn. La unuaj ŝtataj ekzamenoj de Esperanto okazis je la fino de la lerneja jaro. Tri kandidatoj sukcesis en la ekzameno "kun laŭdo".—George Lancaster.

● **PERTH:** En Oktobro okazis en la Urbdomo ekspozicio en kiu la Ligo havis standon sub la devizo "La utileco de Esperanto kiel kromokupo por maljunuloj". S-ro H. McGrath lerte aranĝis ĝin kun la helpo de kelkaj klubanoj, kaj multaj personoj vizitis nian standon.

16/10 A.E.A. Prez. D-ro Ross Robbins, survoje al Singaporo, vizitis Perth. Liganoj atendis lin ĉe la aerodromo kaj kondukis lin al la urbdomo, kie ĵus okazis la antaŭe menciita ekspozicio. Vespere, la Lig-Ĉambro estis plenplena kiam D-ro Robbins montris interesajn lumbildojn kaj amuzis la ĉeestantojn per siaj lertaj magiaĵoj.

La jara ĝenerala kunveno elektis: Prez: S-ro J. Hawks; Vic-Prez: S-ro C. Dean; Sekretario: S-ino G. Polard; Kasisto: F-ino A. Longson; Informado: S-ro J. Finch; Ekzamenoj: S-ino A. Sedgley.

27/12 alvenis en Perth A.E.A. Vic-Prez. Marcel Leereveld (Melburno) kun familio. 30/12 kelkaj Liganoj kunvenis en la domo de S-ino Sedgley por renkonti la gastojn. Ĉiuj pasigis agrablan tempon.

● **MANLY:** Dum la pasinta jaro la Manly Esperanto-Klubo regule kunvenis ĉiun 3-an dimanĉon en la monato en la hejmo de Ges-roj R. Bedwell. La programo estis tre varia: S-ro Mueller - Sorau (kun gramafon-diskoj) pri "Humoro en Muziko"; S-ro J. Matasin: Lumbildo pri la urba akcepto dum la Aŭstralia E-Kongreso; S-ro K. Smith pri "La vivo kaj muziko de Franz Schubert" (kun violon-ludado de S-ino Bedwell kaj kantoj de S-ro Bedwell); S-ro V. Gueltling kun sonbend-saluto de la Hamburga E-Societo; S-roj Yakashi Kawaii pri Japanujo (kun kolorfilmoj); S-ino M. Duncan (kun lumbildoj kaj sonbendoj) pri rapidvizito al Anglujo.

"Manly Parolas", la klubgazeto, aperis dufoje. La estraro: Prez: S-ino M. Duncan; Sekretario: S-ino B. Cleminson; Kasisto: S-rino W. Begg; Societaj aranĝoj: S-ino A. Bracken. Dum la jaro estis fondita kluba biblioteko kaj ĉiusemajne la distrikta gazeto "Manly Daily" presigis la agadon de la klubo.

● **MELBURNO:** Je la fino de la pasinta jaro ni ĝoje ekceptis inter ni kelkajn vizitantojn. El Anglujo venis (survoje al Nov-Zelando) S-ro H. Dodson. Li prezentis memfaritajn kolorfilmojn, pri la kongreso en Harrogate kaj pri vojaĝo tra Aŭstrio (21/11) Bonvenaj gastoj en Decembro estis Ges-roj P. Schwerin el Sydney. Ili ĉeestis 2-foje niajn kunvenojn. La unuan fojon ili ĉeestis 3/12 kiam S-ro Banham faris tre interesan prelegon pri la Poezio, kaj la sekvanta semajnon ili mem prezentis la programon, kiam ili legis historieton el verko de Stefan Zweig.

Nia ĉiam juna kaj aventurema F-ino Amy Godfrey forlasis Aŭstralion por veturi tra Hindujo, Irano, Turkujo, la balkanaj landoj, por iri al Anglujo. Si ankaŭ partoprenos la Universalan E-Kongreson en Sofio. Nia klubo donis al ŝi malgrandan vekhorloĝon kiel bonven-donacon okaze de speciala vespero (17/12).

Kun bedaŭro ni devas raporti la morton de S-ino M. Hermann. Ŝi estis modesta, sed ĉiam oferema ano de nia klubo. Ŝi mortis la 9-an de Januaro pro kancero, post mallonga malsano.

La klubo rekomencis sian agadon 14/1 kiam S-ro H. M. Cohen priskribis sian ferian vojaĝon al Adelaide. Same faris S-ro Leereveld (21/1), kiam li priskribis sian aventureman aŭtomobilvojaĝon tra la Nullarbor-dezerto al Perth kaj revene. Li alportis la salutojn de niaj samideanoj en Perth, en kies mezo li pasigis kelkajn agrablajn tagojn.—H.K.

● **MACKAY (Q'ld):** Laŭ raporto ricevitaj de S-ro H. V. Petley (Prez. de la Rockhampton E-Klubo) fondiĝis nova Esperanto-Grupo en Mackay. La loka gazeto "The Daily Mercury" raportis detale pri la nova grupo. Tio estis la rezulto de bona laboro de nia membro S-ro F. McDonnell. Salutu la novan grupon! (Adreso: P.O. Box 221, Mackay, Qld.)

## ZAMENHOF — FESTOJ

● **PERTH:** 20 ges-anoj kunvenis ĉe "Playhouse" restoracio 15/12 por partopreni Festmanĝon okaze de la Zamenhof-Tago. Post la manĝo ili iris al la ejo de "Women's Service Guild" por festi kune kun aliaj Liganoj la naskiĝtagon de la Majstro.

Post kantado de l' Espero, la jastjara prezidanto S-ro C. Dean raportis pri la agado de la Ligo dum la pasinta jaro. Nia nova prezidanto, S-ro Jack Hawks, faris treege interesan prelegon, kun lumbildoj, pri sia longa mondvojaĝo. Bongusta festkuko, bakita de S-ino G. Pollard, rapide forvendiĝis, profite al la Ligo.

● **MELBOURNE:** 45 ges-anoj kunvenis en la "Esperanto-Centro" (15/12) por kune ĝui la Zamenhofan Tagon. Post bonvensalutoj de la Prezidanto (S-ro E. McKenzie), sekvis piano-ludadoj de F-ino Ann Koppel kaj de S-ro Kim Bastin, kaj komuna kantado de E-kantoj. Angla lingve alparolis la ĉeestantojn S-ro Ken Linton, kiu nome de A.E.A. transdonis donacon al S-ino Milligan (elektra horloĝo), pro ŝia grandega laboro por la A.E.A. Libro-Servo. S-ino Fay Koppel deklamis poemon de William Auld.

La festparoladon pri la temo "La Evoluo de Esperanto" faris S-ro Donald Broadribb, redaktoro de la "Nord - Amerika Esperanto - Revuo". Post kantado de la Espero la anoj ĝuis luksan vesper-manĝeton.

● **ADELAIDE:** Proks. 16 s-anoj festis la tagon de la Majstro. S-ro L. Newell kaj F-ino W. Addis alparolis la ĉeestantojn.

● **CANBERRA:** 20 samideanoj kaj amikoj ĉeestis Zamenhof-Feston 15/12 en la hejmo de Ges-roj Harry. Post bonvenigo de Ralph Harry oni prezentis la filmon "Jen Aŭstralio" kaj ĉiuj ĝuis la duonhoron de belaj koloritaj bildoj, muzikon de John Antill, kaj esperantlingvan komenton.

Tiam sekvis ludo de "Tombolo", dum kiu eĉ la edzoj lernis kelkajn esperantajn numerojn. Venkis Mitzi Zagorskis.

Prelegis Noel Gamble pri la temo "Esperanto kiel moderna helpilo".

Per analizo de la 16 reguloj de gramatiko li elmontris logikan ordon. Li komparis kaj kontrastis la celojn de George Bernard Shaw rilate la fonetika literumado kun tiuj de la Zamenhofa lingvo.

La plej juna membro de la komen-cantoj, F-ino Joy Grant, legis strofون de "La Vojo". Sekvis magnetofone registrita parolado de Prof. Edmond Privat, kies morton oni funebris. La programo finiĝis per kantado de "Sankta Luĉio" kaj de "La Espero".

Dum la vespermanĝeto oni rigardis ekspozicion de libroj enhavantajn binditajn kompletojn de "Heroldo", "Esperanto", "Oomoto", "Scienca Revuo", "Nuntempa Bulgario", kaj "El Popola Cinio".

Bedaŭrinde la anoj de la E-Kluboĵ de la Gimnazio de Canberra ne povis ĉeesti pro libertempoj.—R.L.H.

● **BRISBANE:** En la domo de Ge-sroj K. D. Gunster, okazis la Zamenhofa Festo. Ĉestis 25 personoj, kaj interbabilado, paroladoj, komuna kantado, kune kun kantoj de nia bonvoĉa ano S-ro Norman kontribuis al tre ĝinda programo. S-ro Gunster, Prezidanto de la Societo, alparolis la festantojn, kaj anglalingve bonvenigis studentojn kaj amikojn, kiuj ankoraŭ ne sufiĉe posedas la lingvon.

Ducela festeno okazis la 13an de Decembro en la hejmo de S-ino V. Fraser, Redcliffe. Oni tie festis la naskiĝtagon de Zamenhof, kaj samtempe pere S-ron Gunster, oficiale fondis la Esperanto-Grupon de Redcliffe. Ĉestis tridek personoj, kaj honor-gastoj estis la Urbestro kaj Stata Parlamentano S-ro Houghton kaj S-ino Houghton, la Prezidanto de Brisbane Societo, kaj S-ino Gunster, Ge-sroj Behncken, kaj la UEA delegito por Brisbane. Lerte verkita du-parta teatraĵo de S-ino Fraser ricevis fortan aplaudon, kaj la roluloj, F-inoj Robyn Rollman kaj Elaine Monteith, bone meritis la gratulon ricevitan pro bonega prezentado; Malfacile estis kredi ke post tiom mallonga studado de Esperanto ili povis tiel bonege roli. La 'Heroldo de Redcliffe' dukolone raportis, kaj gratulis la anojn pro ilia laboro kaj entuziasmo, kaj dankis ilin pro bone aranĝita Festo.

—S.L.P.

● **ROCKHAMPTON:** 8/12 okazis la Festo de la Klubo en Rockhampton. Tiu ĉi Zamenhofa Festo havis lokon en la hejmo de Konsilanto T. Bencke kaj S-ino Bencke. Ĉirkaŭ tridek personoj ĉestis, kaj ilin alparolis S-ro Petley kaj S-ro Russell.

Raporto kaj fotografo de la okazo aperis en 'Matena Bulteno', kies redaktoro tre simpatias al nia movado.

—S.L.P.

## NEKROLOGOJ

Kun sincera bedaŭro ni raportas la morton de **Josef Gottlieb** la 7an de Oktobro 1962 en Melburno post longa restado en hospitalo. Li naskiĝis en Pinsk (Rusujo) en la 18a de Junio 1883. Aŭdinte pri Esperanto en 1893, li persone renkontis D-ron Zamenhof en Grodno en 1897 kaj en Dresden en 1908.

Inter la du militoj li aktivis por Esperanto en Kolonjo; post la dua en Hamburgo. Lia plumnomo estas J. Diamo.

Gis sia malsaniĝo li fidele servis nin. Lia artikolo en La Rondo (Majo 1952) elokvente esprimas lian fervoron por nia afero: Detaloj haveblaj ĉe lia filo: L. Gottlieb, WM 8836.

Ni funebras ankaŭ la morton, post mallonga malsano, de **Henry W. Cohen**, patro de nia kasisto, Herbert Marshall Cohen, la 26an de Augusto 1962. Li estis 85-jaraĝa kaj eklernis Esperanton nur kiam li estis 70-jara. Li ĉiam malavare helpis nian movadon.

## PRI MILITOJ

Amikoj kaj malamikoj ofte ŝanĝas siajn aliancojn. Tial nacio, venkinte la malamikon, saĝe farus, se ĝi tuj penas ĝin restarigi—ĉar tre povas esti, ke ĝi bezonos ĝian helpon en la sekvonta konflikto.

(Major-Generalo J. Fuller.)

**Korespondado:** Roman Mazurkiewicz, Zielona Gora, str. Bohaterow Westerplatte 9 (WZSP), Poland.

Mezaĝa ĉeĥa samideano deziras korespondi gaje kaj serioze, sprite kaj interese. Skribu pri vi kaj la vivo ĉirkaŭ vi al: Josef Dolezal, Petrovice 34, p Tynište n. Orl. Ĉeĥoslovakio.

## FILATELISTOJ

Franclingva fakgazeto, kun 40 paĝoj dense, detale kaj ilustre riĉenhavaj. Kolono da Esperanta teksto. Adreso: Le Monde des Philatelistes, 5 rue des Italiens, Paris 9.

## Recenzoj

**Provo Alfronti la Vivon:** Ian St. Georgiev. / Poemaro Originala 111-paga. J. Regulo, Eldonisto, La Laguna, Canary Islands. Prezo 1 Us. dol.

La homo venas, iom fola, en oldan, folan mondon, por lante ekiri tristan vojon, sub luno frida kaj senvitala, aŭ lumo nigra, karba, kaj iufoje en mallumo turpa.

Pli da belo regus sur terglobo, se ne sur ĝi troviĝus hommikrobo, en kies kor' sin kaŝas besto; malsatas ĝi en sia nesto, revante nur pri tuja salt' kaj sanga festo. La viv' malplaĉas, la vivo aĉas! Fino!

Kaj tielade plu plendas nia poeto. Tamen en pli "lumaj" momentoj li foje devias de sia temo tamtama. Post priskribo de la vivo kiel sanga areno, lanta mortado, neascendbla monto . . . li impete ekkrias: Ho ĉarma trezoro de Di!—(la vivo) ne volas mi min apartigi de vi! Psikologoj, klarigu: Kial? Pro kio?

Estas nur juste aldoni, ke en kelkaj poemoj, ekzemple la rimarkinda sur p. 63, ĉi tiu implice konfesita pesimisto penas sin tiri el la marĉo de l'malespero. Tiu versaĵo, kaj aliaj iom similaj, supozigas, ke ni havas spiritan komunian kun vibre sentema homo multe suferinta pro supernormo de intelekta kaj anima forto, plus eksterordinare malagrabra persona sperto de l'vivo.

Wm. Auld, en atentotira antaŭparolo, povus estigi impreson, ke nur devioj de "la dogma linio politika aŭ religia" malsukcesigas Esp-an poezion ĉe legantoj. Efektive, kio ĉefe malemigas homojn legi poemojn, tio simple estas ilia nekomprenebla "enhavo" aŭ esprimformo. Ke simpla poemo devas nepre, per tiu epiteta difino, esti "sensuka", kontraŭas la atesto de la literaturo. Kaj Auld nomas "simplaj" tiujn ĉi poemojn de "minora" poeto, kiu, ekstaza, "soras" super la bana-leco.

Ho ve, denove! "La konsterniga . . . fantom'." (konsterna aŭ konsternanta).

**Ekzilo kaj Azilo:** Emba (Emeriko Baranyai). Poemkolekto. 164 p. 1.50 Us. dol. Sama eldonejo.

Jen homo, kiu, malgraŭ ĉia viviteruro, radiis el si eternan esperon. Hungaro, kiu vivis en malfacila situ-

acio ekonomia kaj politika, li ĉiam aktivis por nia idealo. Alte dotita de la Muzo, li fekundis je proletecaj, satiraj kaj iufoje tre "teneraj" versaĵoj, el kiuj la nuna elektaĵo certe meritas vastan prikonon.

Li elspiras sopiron, kaj kredon:

Ej, ne aŭskultu pri la vana grumblado de poet' malsana, sed vivu vivon, faru devon kaj amu amon, revu revon!

Demandu foje floran kampon se l'vivenuo vin invadas, ĉu indas vivi nian vivon.

La kampaj floroj kapjesadas. Imprese kernecaj autobiografiaĵoj troviĝas en la simple sinceraj poemoj MI kaj La Neakireblajo: Li "plugis, lernis, flegis, verkis . . . tamen ne akiris skribmaŝinon".

Amuze li nescie kontraŭas la donitan difinon de la neologismo "olda" (maljuna): "Li estas ne maljuna, eĉ se olda".

Mi salute konfirmas lian lertan vortjonglon: "Regulo Perez plej regule peras verslibrojn . . ." kaj aldonas, ke tiu ĉi lia estas unu el la plej bonaj.

**"Monda Kulturo,"** kvaronjara kultura revuo de U.E.A. Redaktas: Wm. Auld. 32 p. £2 jare Aŭstralia.

Malfacila estas la tasko reprezenti mondvastan revuadon de kulturo por homoj, ĉiu el kiuj estas familiara nur kun la propraj animesprimformoj. Penante plaĉi al homoj de tre diversaj nacioj kaj literaturaj gustoj, oni nepre malplaĉos al multaj individuoj. Nur certaj kontribuoj trovas simpatian ĉe la unuopuloj—ĉiu peco por ties destino.

Tamen ni esperas, kaj rajtas kredi, ke la redakcio de M.K. sukcesos en sekvantaj numeroj doni multe pli valoran kompilon da legajoj. Jam la alta prezo postulas tion.

La ĉefa novelo, "Feliĉa Amo", tedas pro manko de verve drama epizodo, kaj senstimule limakas vojon ĝis sia deka kolono. Ĝi interesos ĉefe studentojn de l'animkonduco kaj ties reagoj al donitaj situacioj. Naŭ aŭtoroj el ok landoj kontribuis. "Du Poemoj" estas enigma konfuzajo. Kial por tiaspeca galimatio nia mirinda lingvo devas servi?

Ne en la "glosaro": p. 30: pedigriritaj! Kial ne simple "aprobataj",

"oficialigitaj" aŭ simila? La vorto ne estas "inter-Eŭropa", se ne paroli pri "internacia".

#### LOGIKO: Martinus

El la Dana originalo tradukis Ib. Scheicher. 200 p. Formato 18 x 25 cm. Baza verko de la Martinus Instituto, Mariendalsvej 95-96, Copenhagen. 22 Danaĵ kronoj.

Verŝajne la plej impona libro pri "antropozofio" aŭ simila ĝis nun aperinta en Esperanto. Forte kontraŭmaterialisma, la verko estas mirinde kompilita komplekso da liberala kaj fundamentalisma Biblismo kun forta ingredienco de eksternormala biologia scienco. Laŭ nia koncepto, kiom ni povas kompreni la erudician verkon, la spirito kaj intelekta sinteno de la aŭtoro estas kelkrilate parenca kun la instruo de Svedenborg, alia treege fekunda esploro de la kampo de la "hom-esteco".

"Logiko" havas 95 ĉapitrojn kaj citlokan liston. Taŭge kaj laŭmerite recenzi la libron postulus la spacon de tuta gazetnumero. Ni nur povas direkti al ĝi la atenton de la malmultaj legantoj sufiĉe intelektaj kaj anime orientitaj por ĝin racie absorbi.

#### "LA MARVIRINETO"

De H. C. Andersen. El la Dana tradukis Ib. Schleicher. En 75 paĝoj de formato cole 8 x 10. Prezo 20/- Aŭstralia. Eldonis: KOKO, Randbolvej 4, Copenhagen F.

Vera juvelo de la parto eldonista. Faritaj de famaj Danoj, dudek koloraj bildoj ornamas la rakonton mem. kaj freskoj la biografion de la fabelisto.

Bonege la libro servas al ĉiuj — por propra leguĝo, por kroma donaco al amikoj, kaj por komparado de la elgermana Zamenhofa teksto kun tiu ĉi de la Danlingvulo.

Andersen, Grimm kaj Perrault — la nekompareble plejĉefaj majstroj en sia verkspeco. Per tiu ĉi mirinda eldonaĵo, almenaŭ la granda Dano ricevis taŭgan prezenton al internacia publiko.

The NIXON Esperanto Vocabulary: English-Esperanto, Esperanto-English. Pocket size, 178 pages. Dedicated to the late Miss V. C. Nixon, founder of the Society of British Esperantist Teachers. 4/3 Aust. includes postage.

Part 1 appeared in 1956 and was widely welcomed. Now we have also Part 2, which contains (a) all the commonest Esperanto roots; (b) nearly all the less common roots which cannot be easily guessed by an English-speaking pupil. Several American English definitions are added where they differ sharply from those of British English. At 62 Rother Cres., Gossops Green, Crawley, Sussex.

**Revelacio:** Domenico Pastorello. Trad. el la Itala F. Franceschi. 16 p. Senpaga ĉe D. Pastorello, Fos sur Mer, (B. du Rh.), France.

La fondo de Romo okazis 750 jarojn antaŭ la nasko de Jesuo Kristo. En iom stranga monografio D.P. penas paraleligi la historion de Romulo kaj Remo, la legendaj fondintoj, kun la Nova Testamento. Li pritraktas verkon de Tito Livius, en kiu tiu historio troviĝas, donante tridek ekzemplojn de simileco rimarkitajn de li . . . la supernatura naskiĝo de Romulo kaj Kristo, ilia genealogio, bapto, reĝeco, mirakloj, ĉasteco, supreniĝo ĉielen, revidatiĝo k.c.

La aŭtoro atentigas, ke Tito Livius mortis en 17 P.K., do nenion sciis pri Jesuo kaj la Evangelio. Sekvas do, laŭ lia rezono, ke la Nova Testamento estas nur "disvolvigita kanvaso de antaŭa fabelo".

Makulas la monografion neplaĉa dogmememo, vidata en frazoj, kiel: "(Paŭlo) certe legis la verkon de Tito Livius"; ". . . la analogeco (inter Marso kaj la Sankta Spirito) estas perfekta"; "La forrabado al la Sabinaj virinoj korespondas kun la Kristana edziniĝo — ĉe la altaro?"

Multaj malkonsentos lian tezon, vidante en ĝi frukton de fantazio garranta skeleton el kelkaj dubindaj koincidoj.

La tradukinto misuzis "sakra" (devas esti: sankta).

**Malsupra Silezio:** 128 p. Pledas ĝeneralan agnoskon de la Poleco de tiu regiono — la Odra-Nysa. Post prezento de la naciaj pretendoj sekvas favoraj voĉoj de alilandaj jurnaloj kaj ŝtatviroj.

Ĉe: Pola Esperanto-Asocio, ul. Du-bois 3, Wrocław. 4 r.p.k.

**Fabeloj por Etuloj kaj Plenkreskuloj:** F. Škrlić (tradukis el la Kroata J. Velebit). 48 p., ½ U.S. dol.

Dulingva: Kroata kaj Esperanta. Pre-  
cipe niaj Jugoslavaj amikoj ĉe ni  
sentus intereson pri la traduko. Ilus-  
trita de I. Večenaj. Osnovna škola  
Rudes, Rudeška 71, Zagreb.

### MIRAKLOJ DE LA MENSO

Jen kelke da supozinde aŭtentikaj  
ekzemplo de homoj, kiuj faris rimark-  
indan laboron en Esperanto, lerninte  
ĝin en tre mallonga tempo.

**George Cox** E-istiĝis 1905; lia 371-  
paĝa Komentario kaj Gramatiko  
aperis 1906. Antaŭ sia morto 1909 li  
eldonis tradukojn en Mil kaj Unu  
Noktoj kaj partoprenis la tradukon  
de la Nova Testamento.

**A. E. Styler** 1913 gajnis la Prezi-  
dantan Premion per sia "En la Mon-  
toj", post nur dumonata studo de  
E-o. Garantias tion B. Mudie, la  
tiama prez-o de la B.E.A. En Majo  
1914 aperis lia senrima traduko de  
In Memoriam (Tennyson). Post  
tiam, silento. Li mortis 1928.

**Leo Belmont** skribis sian faman  
kaj relative bonstilan leteron al  
Zamenhof en 1887, la jaro de la nasko  
de E-o. Vidu: Literatura Mondo  
1/35: Pola E-isto, 8/12, 3/35.

**Giles Dixey** 1933 tradukis la dekan  
libron de la Odiseado de Homero en  
monato, post duhora studado de E-o.  
Kio poste fariĝis kun tiu "geniulo"?

**Enrico Dondi** komencis traduki la  
Purgatorion de Dante post kvar-  
monata lerno. Ĉe la Bologna Kon-  
greso en 1955 li gajnis la duan  
premion per traduko—Manfredo—el  
tiu grandioza verko. Tiutempe li jam  
preskau kompletigis tradukon de la  
tuta poemo, sed ankoraŭ ĝi ne aperis  
libroforme. "Esperanto" Sept. 1955,  
p. 253; Dec., p. 356.

**Henri Baupierre**, en sia "Speci-  
mene" (Stafeto) brile stilparodias aŭ  
ripastiĉas 41 aŭtorojn. Laŭ sia an-  
taŭparolo li aliĝis al la movado en  
Decembro 1958.

### STATU' MARMORA

Staras en muze' statu' marmora  
de iu ĉarma nudistin-figuro.  
Allogas min rigardo dolĉamora;  
invitis ŝi admiri kun plezuro.

Je nia proksimiĝo ŝi ne hontas;  
ŝi bonvenigas per ridet-saluto—  
Saluton nian tamen ne respondas,  
sed restas ĉiam en eterna muto.

### DUMNOKTA PENSO

En malhela nokto ŝtorma  
lite kuŝas mi maldorma.  
Pensado mia estas malproksima,  
kaj min turmentas bruldolor' anima.  
Mi revas pri amikoj longe foraj  
kaj pri la tagoj tiel dolĉmemoraj.  
Ve! Ĉio tio estas de mi for—  
neniu min konsolas en ĉi hor'.  
—Armand Su, Tientsin.

### MORE THAN 800

Esperantists with their families  
spent holiday last summer at the in-  
ternational Esperanto hotel on the  
Adriatic sea. Moderate tariff and  
rebates. Information: Internacia Es-  
peranto-Somerumujo, Primošten, ĉe  
Sibenik, Jugoslavia.

### LA KATALUNA

La Hispana reĝimo permesas la  
uzon de la Kataluna lingvo nur por  
libroj, sed ne por ĵurnaloj radio, pub-  
likaj lernejoj, publikaj paroladoj, juĝe-  
joj k.t.p.

La permesataj eldonadoj en la Kata-  
luna lingvo ĉefe taŭgas por kredigi,  
ke la reĝimo ne estas kruela kontraŭ  
tiu lingvo kaj kulturo, ĉar ĝi kon-  
scias pri la malbono limigi la nor-  
malan uzadon de la lingvo. Ĝi mal-  
permesas la lernadon de la lingvo,  
por ke ne estu legantoj, aŭ nur tiuj  
malmultaj, kiuj private (aŭtodidakte)  
lernas. En ĉiuj lernejoj, eĉ privataj,  
permesata estas uzi nur la Kastilan.

### A.E.A. ADRESARO

You should have received your copy  
of the 1961-Adresaro. It is a rough  
proof of the one for 1963, which will  
issue before the end of the year.  
The letters of the fourth indication  
series mean: P: Pyke Memorial Di-  
ploma; E: Elementary Diploma of  
A.E.A.; B: Superior Diploma of  
A.E.A.; and K: Advanced (Klereca)  
Diploma of A.E.A. The letters of  
the fifth mean: A: that the name of  
the member appeared in the 1944-  
Adresaro, and I: that the member is  
a professional teacher.

Kindly advise me of anything you  
think should be altered, so that the  
coming issue may be as complete as  
possible. Only the names of those  
having paid before the end of July  
will appear in the 1963-Adresaro.

—KEN LINTON.

## FANTASY ON THE DEATH OF ZAMENHOF

Warsaw — April, 1917

Through Europe's fields the flame of  
 battle roared—

In Warsaw grim, on Poland's hate-  
 torn soil,

An exiled spirit to the empyrean  
 soared

And hands of healing, nerveless,  
 ceased from toil.

Did through his brain in those last  
 mortal hours

There run a theme most grievous to  
 his mind?

This namely: "Recompense so poor  
 to these my powers!

What sparse and bitter tribute from  
 my kind!

Did I towards my fellows vainly live,  
 And spend my days in labour but  
 for nought,

Pour out in waste all that I had to  
 give—

My health, my time, my money and  
 my thought?

With dark persistence works a fretful  
 bane,

Suggestions dark that fill my heart  
 with gloom:

'To lift God's Babel-curse you work  
 in vain;

'Gainst man's poor effort stands a  
 changeless doom'.

The same is true, alas, of this my  
 creed (1)—

Inspired by Hillel, Israel's large-  
 souled son—

Most deem it tedious dream stuff;  
 few pay heed.

With such poor allies ground for  
 faith's not won.

Crude epithets my colleagues' lips did  
 frame

To cast upon my sad and bowing  
 head (2)—

The road, to Him in all men's hearts  
 the same (4),

Is not for souls of vision weak to  
 tread.

Amid the ranks of one-time helpers  
 true

Negation's mocking spirit found a  
 place (3)—

'The language-maker's now the  
 Prophet-Jew,  
 With all the mystic nonsense of his  
 race.'

Far from his mind such morbid  
 musings lay

As moved the moments towards the  
 final breath.

A faith, rock-firm, remained the  
 constant stay,

And bore him fearless through the  
 gates of death.

We hear a voice from fadeless fields  
 Elysian:

Towards us here the Sage and Mentor  
 signs—

To us on earth, who front a frightful  
 legion

Of plagues that shaken hearts to fear  
 inclines.

Says he: "Poor souls, with dull  
 despair beset,

Cast off the fears that hold you in  
 their thrall!

In every place where Love and Need  
 have met,

God's dews of blessing sweet do ever  
 fall.

It was not meet that I should stay  
 to witness

The last full fruitage of my work  
 with you.

My task alone—to show the world  
 my fitness

To serve the Truth, its toilsome way  
 pursue.

And from that Truth no force of  
 Fate could rend me,

E'en in the hour when life was  
 flickering low.

The All-Creator, Who to earth did  
 send me,

Has blessed all worthy work—will  
 bless it now.

Indeed, the victory these mine eyes  
 shall see (5)

When, in a world where weapons  
 have no place,

From fear, suspicion, men shall then  
 be free,

And trust instead shall motivate the  
 race.

The tongue of men, full-freed from  
Babel's bar,  
Millenniums of muteness now behind—  
One blood, one language, under  
Hope's bright star,  
Each soul, each heart, responsive to  
its kind.

O brothers black, and brown, and  
white, and yellow,  
In aims united, though diverse by  
skin—  
Each child of God shall selfless serve  
his fellow,  
And so the Golden Age shall usher  
in". . . .

On this high note of hope the  
message ceased—  
Winged words from him whose task  
is nobly done.  
From this world's intrigues God his  
soul released;  
His eyes shall see with joy the victory  
won.

Love's offerings, flowers of pain,  
mankind doth spurn  
And view such blessings with rejecting  
mirth.  
But Truth triumphant shall these  
laggards turn  
And dull minds lighten to enduring  
worth.

From point in Time when reason  
came to birth,  
The seer with fire of service in his  
heart  
Has grieved and suffered through his  
span on earth  
And faced, defiant, Opposition's dart.

Saints and Saviours to the scaffold—  
Rack and gallows for the good;  
Steep the path of human progress—  
Freedom's ever bought with blood.

NOTES: (1) Zamenhof regarded as of the utmost importance his "auxiliary" religion, based on the philosophy of Hillel (c. 70 B.C.), but with much of his own thought compounded with it. There were times when he held it to be of even greater importance than Esperanto, and asserted that one could not survive without the other. It is a simple ethical form of religious conduct based on the Golden Rule and designed to serve as a

means of religious conduct by those meeting on grounds of differing faiths. What Esperanto is to language, so Hillelism is to religion—an auxiliary form for use among diverse believers, an essential synthesis of creed to which "every noble-thinking man could subscribe."

(2) In 1905, before the World Esperanto Congress in Boulogne, his friends bitterly opposed his wish to declaim The Prayer under the Green Standard, with its references to "the mysterious bodiless Power," &c., and to "Christians, Hebrews or Mahometans—we are all the sons of God"—a sincere appeal for credal unity or reciprocal tolerance.

(3) Faust (Mephisto)—"the spirit that eternally denies" ("Faust's Study").

(4) At Boulogne Zamenhof said: "Brothers with the same God in their hearts."

(5) Job 19: 26-27: "I shall see for myself, and mine eyes shall behold..."  
(See La Rondo, No. 63.)

### JUBILEO KATOLIKA

Lau "Espero Katolika", tiu Esperanto-revuo estas la unua en la mondo, kiu povas festi la diamantan (sesdek-jaran) jubileon de sia fondo. Fondis ĝin pastro Emil Peltier en Oktobro 1903.

En Nov. 1903 aperis "The Esperantist" (Londono). Ĝi cedis lokon al, aŭ fandiĝis kun, "The British Esperantist", kies unua n-ro aperis en Jan. 1905 kaj ankoraŭ aperadas.

Gratulon! Tamen nin malagrabla frapas la fakto, ke post 60 jaroj ambaŭ gazetoj, simile al preskaŭ ĉiu alia E-a, ankoraŭ baraktas konservi modestan vivon. Ŝajnas al ni, ke la financa situacio rilate E-ajn gazetojn estas verŝajne eĉ pli malbona ol en la frua tempo, kiam ilia eldonado iris pli regule kaj akurate.

Tielnomataj E-istoj ne povus pli taŭge honori la bravajn fondintojn kaj ties kolegojn, ol per tuja abono kaj fidela subtenado al iliaj testamentaĵoj.

### "OKCIDENTGERMANA REVUO"

Ehrenburgstr. 1, Koln-Riehl, W. Germany. Aktualajoj pri Okc. Germanujo. Specimeno havebla ĉe F.R.B.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 33 (113)

MELBURNO

Marto - Aprilo, 1963

---

## ESPERANTO AND THE TOKYO OLYMPICS

### Australian's Letter to California Track Champion.

18th March, 1963.

Dear Bob Mathias:

Yesterday, as I heard you talking sport with the Filipino boatman below the waterfall at Pagsanjan I thought: "How much easier it is for the peoples of the United States, and Australia, and the Philippines to be friends because they have a common language, English!"

And I said to myself: "What a pity all the athletes of the world could not talk to each other as friends. If only the Olympic Games, which were designed to build friendship (but which have too often accentuated international rivalries) could demonstrate the possibilities of a "lingua franca!"

Much, we know, can be said by a smile, a wave, and a handshake, and of course there are groups who can talk among themselves—the French-, Spanish-, Russian- and German-speaking "blues". And some use can always be made of interpreters, official or unofficial.

But my dream goes beyond these expedients. Interpreters will be necessary in Tokyo so that visitors and participants can speak with the local Japanese people—but I believe the athletes **could** use a common language among themselves.

For some years I have been experimenting with the international

language, Esperanto, as a medium for diplomacy and conferences. It can be learned in a quarter the time needed for any national language, because its pronunciation is phonetic, its grammar simple and regular, and its vocabulary drawn from the common stock of Indo-European roots.

I believe athletes going to the games could learn enough Esperanto in half a dozen lessons before they left home, and in the aircraft on the way, to be able to say some friendly things to their fellow competitors . . . the sort of things I imagine you have often wished you could say, but have been prevented from saying because of the language barrier.

In any event I propose to suggest to the Esperanto Association in each country that they offer to each member of their team for the Tokyo games a short course of Esperanto. I shall also propose that the Universal Esperanto Association publish a phrase book and glossary in three columns—Japanese, Esperanto, with a blank third column in which the national associations can print (or write) their own equivalents. This phrase book would be useful even for athletes who had not been able to learn Esperanto. They could point to the phrase they wanted to use.

If you agree with these ideas, I would greatly value your comments on them, and (a) a message to the

sportsmen of the world urging them to learn to speak to each other, in the interest of international peace and friendship; (b) suggestions as to words and phrases most useful to an athlete at the Olympic Games in Tokyo who wished to talk to his fellow competitors. A few possibilities are set out on the attachment.

I am confident that the above plan would have the support of Sir Wilfrid Kent-Hughes (himself an Olym-

pic athlete) who organized the Melbourne Games, and of our Minister for Transport, Mr. Opperman. I am sure it will have the backing of the Universal Esperanto Association, which has already asked the Japanese Esperanto Institute to make suitable arrangements for the welcome of Esperanto-speaking visitors to the Tokyo Games.

I am, yours sincerely, R. L. Harry.

### A FEW SPECIMEN PHRASES FOR ATHLETES

Esperanto.	National Language.
1. Saluton!	Hello, hi!
2. Amiko	Friend
3. Bonan matenon!	Good morning!
4. Sidiĝu kun mi	Sit with me
5. Ĉu ni marŝu kune?	Shall we walk together?
6. Kio estas via fako?	What is your speciality?
7. Kio estas via sporto?	What is your sport?
8. Vi rompis la rekordon	You have broken the record
10. Vi gajnis oran (arĝentan, bronzan) medalon	You have won a gold (silver, bronze) medal
11. Ĉu vi vizitis mian landon?	Have you visited my country?
12. Mi esperas, ke vi venos	I hope you will come
13. Ĝis la revenido!	Au revoir
14. Mi revidos vin en . . .	I'll see you in . . .
15. Ĝis la venontaj ludoj!	Till the next Games!

(A first column would be in Japanese)—R.L.H.

### PRI MENDOMONO

Ni supozu, ke alilanda libro estas prezfiksita je 15 steloj (= dek ŝilingoj). Sendi la monon per poŝta monmandato kostas al vi 12½ ŝ., pro la kurzo. Pagi tiun sumon estas necese, por ke la vendanto ricevu ĝuste 10 ŝilingojn Aŭstraliajn.

Se vi estas agento por alilanda gazeto, kies tarifo ekzemple estas 10 ŝ. jare, vi kompreneble vin trovas en la sama situacio, se vi ne havas interkonsenton kun la gazet-administracio pri kurza rabato—ekzemple, por ĉiu pundo kolektita vi deprenas kvaronon ĉe la monsendo. Tio ebligas al vi, sendi la precizan sumon de vi peritan.

La antaŭlasta numero de "La Nica Literatura Revuo" aperis. Espereble ĝiaj ŝatataj kontribuantoj aliĝos al la enhavigantoj de "Monda Kulturo", la nova revuo de U.E.A.

"Norda Prismo", Barnhusgatan 8, Stockholm, urĝe bezonas abonantojn. Ĝi meritas pli vastan subtenon. 34 steloj. Dumonate ĝi aperas.

### NEW ZEALAND PRESS

Miss Cox, of Melbourne, sent three cuttings. One from the Evening Post, 16/4, tells of Mr. W. H. King's experiences with Esperanto in 48 countries; the same paper, 1/4, reviews the Esperanto translation of "East and West," published by the U.E.A. with Unesco. The Weekly Times, 27/3, features the Esperanto "key" booklet given to all members of the N.Z. team off to Tokyo for the Games. Similar action is being taken in other countries by Esperanto organisations.

### PRI "MARTA"

P. 2: 9/10—" . . . en la formo de Adoniso, dormanta sur ia mistero". Tiu frazo cerbumigis eĉ George Gordon, la Nov-Zelanda majstron, kaj certe multajn el ni malpli Esperantolertaj. Kio signifas: "dormanta sur ia mistero"? Ĉu iu, prefere Pola, samideano povus informi nin? La verko estis tradukita en la Japanan; Japano povus informi nin pri la senco aprobita por la eldono en sia lingvo.

## Australia Kroniko

● **PERTH:** Ĉu Turistaj Mondvojaĝoj havas verajn valorojn? estis la temo de la 1-a konversacia vespero post la ferioj. (14/3), kiun gvidis nia mondvojaĝanto Jack Hawks.

Ĉiuj ĉeestantoj kontribuis al la debato kaj oni ĝenerale konsentis ke turisto kiu rapidas de loko al loko ne gajnas multe. Bonvena vizitanto estis F-ino C. Morris el Anglujo.

D-ro C. Caldera parolis pri "Esperanta Libroleĝado" je 28/3. Laŭ li multaj legantoj nur interesiĝas pri la enhavo de libroj kaj tute ignoras lingvajn detalojn. Li emfazis ke nur per plurfaj legado oni povas ensorbi la literaturan valoron de verko.

S-ro A. J. Waugh estris interesan vesperon je 11/4; li alportis magnetofonon kaj ĉiu ĉeestanto laŭvice registris sian voĉon sur la sonbendo. Poste ni auskultis niajn voĉojn kaj povis multon lerni pri prononcado kaj parolmaniero.

● **MELBOURNE:** Ĉiulunde en la Esperanto-Centro okazas nun 3 kursoj: En la granda salono S-ino Valda King, kiu mem eklernis Esperanton nur lastjare, instruas komencantojn de la 7-a ĝis la 8-a, dum S-ro M. Leereveld ekzercigas la novulojn en simpla konversacio kaj kantado. En la manĝsalono S-ro F. V. Taylor instruas progresintojn de la 7-a ĝis la 8-a kaj S-ino A. Leereveld gvidas la konversacion de la 8-a ĝis la 9-a. Krome okazas Traduk-klaso kies instruistoj estas S-ino F. Koppel kaj S-ro K. Linton. Poste, de la 9-a ĝis la 10-a okazas la grupvespero kun varia programo.

Revininte de feri-vojaĝo, S-ro M. Leereveld prelegis (4/2) pri vizito al Hobarto kaj aŭtomobil-vojaĝo tra Okcidenta Tasmanio. S-ro F. V. Taylor, per diapozitivoj, rakontis (25/2) pri sia vizito al Hispanujo. Okaze de Poezia Vespero (4/3) S-ro Linton prelegis pri "Vers-Tekniko". Li ilustris sian prelegon per ekzempleroj elĉerpitaj el la E-Poezio, kiujn li projektis sur ekranon per diapozitivoj.

Duflanka programo okazis je 11/3: S-ro H. Koppel raportis pri "Novajoj el Esperantujo", kaj S-ino F. Koppel per citaĵoj el "Bakŝiŝ" montris kiel majstre S-ro L. N. M. Newell kapablas pentri bildon per nur malmultaj

vortoj. Novspeca arango estis "Tupper-Vespero". Vendistino de la konata amerika Tupper-Kompanio de plastikaj varoj por la kuirejo prezentis siajn varojn kaj trovis entuziasman klientaron, el kies mendoj rezultis 10%-a profito por la klubkaso. Pri la "Ritmo en la Poezio" parolis D-ro A. Fridenbergs (1/4). Uzante klasikajn citaĵojn, li montris kiel la ritmo akordigas kun la temo, kaj kiel ĝi povas servi praktikan celon plirapidigi laboron aŭ gajigi marŝantajn soldatojn.

En la januara kunveno de la RENDEUVUO S-ro E. Ottens prelegis pri fabrikado de diversspeca papero. En Februaro malnova Esperantisto S-ro Roy Rawson, kiun ni jam delonge ne vidis en nia mezo, interese prelegis kun lumbildoj pri sia 1961-a vojaĝo tra Eŭropo kaj ĉeesto ĉe la 46-a Univ. Kongreso en Harrogate. En Marto D-ro Fridenbergs parolis pri "La Instinkto de Vivo kaj Morto". Li donis multajn ekzemplojn el homa kaj besta vivo ke la emo sin ekstermi povas esti ne malpli forta ol la emo vivi.

### "Mortis" la Melburna Esperanto-Klubo

Marto 18 okazis la Generala Kunveno de la Melburna E-Klubo. Ekstaris kun "juna" entuziasmo S-roj W. J. Drummond kaj F. V. Taylor kaj diris ke la nomo "Klubo" tro memorigas al "Drink-Klubo", malinda je kultura organizo. Ili proponis ŝanĝi la nomon al "Melburna Esperanto-Societo". Kvankam la plimulto de la ĉeestantoj opiniis ke gravas la spirito kaj ne la nomo, tiu propono estis akceptita. Elektiĝis la jena estraro: Prez.: S-ro E. McKenzie; Vic-Prez.: S-roj W. J. Drummond kaj J. Ryding; Kasisto: S-ro M. Cohen; Sekr.: S-roj H. Koppel kaj D. Kane; Edukaj aferoj: S-ro M. Leereveld; Informado: S-ro F. V. Taylor; Biblioteko: Ges-roj D. Broadribb kaj I. Heldzingen.

La nova 2-a sekretario, S-ro Daniel Kane, estas 15-jara knabo, kiu lernis Esperanton en nur kelkaj monatoj per mem-instruado kaj nun fariĝis entuziasma kunlaboranto en nia klubo.

**Esperantista Renkontiĝo en Morwell:** Dum la paskaj festotagoj (12-15-a Aprilo) okazis en Morwell, en la ĉarma kaj industria Latrob-Valo, Es-

perantista Feri-Semajno. Partoprenis 22 E-istoj el 4 urboj, i.a. S-roj F. Mueller-Sorau el Sidnejo kaj Syd. Grant el Port Lincoln (Suda Aŭstralio) La organizanto de la ferisemajno estis A.E.A. Vic-Prezidanto I. Maddern, Direktoro de la loka alternejo, kie okazis la kunvenoj kaj kie kelkaj eĉ dormis.

Okazis 2 prelegoj: S-ro M. Leereveld parolis pri la instruado de lingvoj en niaj lernejoj kaj D-ro Fridenberg pri la historio de lingvoj. Ni kune kantis E-kantojn, aŭskultis E-sonbendojn kaj diskojn kaj vidis diazopozitivajn pri la lasta kongreso en Sydney kaj pri vojaĝo tra Hispanujo de S-ro J. Ryding. Posttagmeze ni faris 2 ekskursojn per aŭtomobilo: Unu tra la bela kamparo kaj unu por viziti la vastegan karbo-minejon de Morwell. Okazis ankaŭ kunsido de la "Aŭstralia E-Societo de Instruistoj".

Apartan dankon meritas ne nur S-ro Maddern, sed ankaŭ lokaj sinjorinoj: S-rinoj R. Farrington, H. Morellato, V. Davis kaj S-ino Maddern, kies bakajoj "dolĉigis" nian ĉeston. Eptute la ferisemajno estis granda sukceso, ĉefe pro tio ke al nia dispono estis la bela alternejo de Morwell. Mi demandis S-ron Maddern, ĉu li havis malfacilaĵojn por akiri permeson de la aŭtoritato. Modeste li diris ke la afero estis tre simpla: La sekretario de la Morwell E-grupeto (S-ro I. Maddern) faris petskribon al la estro de la Morwell Alt-Lernejo (S-ro I. Maddern), kaj tiu grandanime konsentis. Ĉiuj ĉeestantoj esprimis esperon denove veni al Morwell dum Pasko 1965.

—Herbert Koppel.

Pri la Esperanto-Renkontiĝo en Morwell detale raportis la loka gazeto "Morwell Advertiser". La tri Radio-Stacioj 3GI, 3TR, kaj 3UL dissendis raportojn antaŭ kaj post la kunveno. Krome okazis intervjuo kun S-ro I. Maddern ĉe la Televid-Stacio GLV 10.

### VOJAĜO AL MELBURNO

Ekde la geedziĝo en '56 ni prokrastis ferion; ĝis finos studado . . . , ĝis financo permesos . . . , kaj poste ĝis filino Kay iom pli aĝos . . . , ktp. Tial, kiam la ĉi-jara libertempo venis, ni decidis aĝi grandskale, veturi al

Melburno per aŭtomobilo kaj viziti esperantistajn amikojn survoje. La naŭan de Marto, farinte kuŝlokon por la infano en la malantaŭo de la aŭtomobilo, ni forlasis Brisbanon.

Post unu tago ni atingis la hejmon de Grace kaj Walter Kirkwood apud Coff's Harbour, kaj antaŭ ol forlasi tiujn ni dum du horoj amuziĝis per ĝuinda rememorigo de la pasinteco. Bedaŭrante ke ni ne povas resti pli, ni reenaltiĝis por daŭrigi nian al-sudan vojaĝon.

Ni atingis Sidnejon lundovespere, kaj tuj serĉis la Esperanto-domon. Ni trovis ke kunveno okazos, kaj decidis arangi pri "motelo" kaj tiam reveni al Esperantujo. Malfeliĉe, pro nekono pri la urbo ni trovis dormolokon malfrue, kaj kiam ni revenis al la klubo la anoj estis pretaj foriri. Tamen, ni ĝuis tason da teo kaj konversacion kun la ĉeestantoj, kaj poste vizitis la apartamenton de Fritz Mueller-Sorau, kie ni pasigis la restadon de la vespero. Volo Gueltling tre bonkore gvidis nin tien, kaj poste reen al la vojo motelen, pro kio ni ŝuldas nian dankon. Ni konsilas al ĉiu, ke viziti la Sidnejan Esperanto-kvartalon sen viziti la interesejan hejmon de Fritz estus kvazaŭ viziti Moskvon sen vidi la Metro'n, aŭ Pekinon sen vidi la akvobarilon apud la Ming'a tombejo.

La sekvantan matenon ni ekveturis Melburnen, kaj post du tagoj, je la sepa matene veturinte la tutan nokton, ni transiris la limon de tiu trafikplena urbo. Lacaj pro maldormo, ni ege deziris trovi loĝejon. Terure altaj tarifoj metis motelojn kaj hotelojn ekster la poŝo de laboristo; do ni serĉis kaj trovis la agrablan, ne tro altkoston hejmon de S-ino Eva, "Kynance", Barker's Rd., Kew. Ni rekomendas ĝin al ĉiu vojaĝanto.

Ĉe Ges. Milligan en Melburno ni priparolis la libroservon kaj la miniaturan fervojon, kaj ĉe Ges. Banham la tradukarton. S-ro. Koppel renkontis nin, montris al ni la Melburnan Esperanto-domon kaj akompanis nin al la hejmo de la Ges. Leereveld, kiuj satigis niajn korpajn kaj spiritajn apetitojn. La sekvantan matenon Ges. Linton gastigis nin kaj post tagmango ni adiaŭis kaj ilin kaj Melburnon kunajn. Ni veturis rekte al Brisbano, sen iri al Canberra, ĉar la longaj horoj en la aŭtomobilo komen-

cis enuigi la pli junan anon de la

Ni esperas ke la multa sperto, kion ni gajnis pri vojaĝado, kiu ja estas arto en si mem, utilos ofte al ni. Certe helpas al la Brisbana Klubo la valoraj sugestoj kiujn ni ricevis, parolante kun anoj de la pli grandaj, sudaj kluboj.—G. A. Grant.

**ORIENTAJ ANTAUURBOJ:** 15/3 je 8 p.t.m. Cestis 18 personoj la ĝeneralan kunvenon en la hejmo de S-ino I. Fink. Post raporto pri pasintjara agado, ili akceptis novajn statutojn kaj elektis estraron por la nova jaro: Prez.: Stanley Milligan; vicprez.: S-ino M. B. Smith; sekr.-kas.: S-ino I. Fink; bibliotekisto: S-ino M. Saunders; protokolisto: F-ino Margaret Saunders; kaj du kromaj estraranoj—Peter Priestley kaj S-ino E. Stafford.

Organizante bibliotekon, ni petas donacojn de libroj al: 32 P.O. BOX, Mt. Waverley, Victoria. Ĉiu klubano nia decidis donaci po unu libro, aĉetante ĝin ĉe la A.E.A. Libro-Servo, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills.

15/4 ni tuttage piknikis en ia montaro Dandenong kaj gajne revenis kun korboj plenaj de frandaj fungoj.

Du kursoj viglas: komencantoj 7 kaj progresantoj 7. Tri kursanoj planas mondvojaĝon en la jarfino. Informoj pri nia klubo aperis en Progress Press, Chadstone Progress kaj Oakleigh/Caulfield Times.

—Irene Fink.

● **CANBERRA:** 13.2.63 okazis la 11a ĉiujara ĝenerala kunveno de la Kanbera E-Klubo. Oficistoj estas elektitaj jene: Prez., S-ro Noel Gamble; vic-prez., S-ino Joan Monaghan; kasisto, S-ino Audrey Pill; sek., S-ino Jean Harvey; helpsek., D-ro Ross Robbins.

Ĉiunonate merkredon la studrondo kunvenas, kaj denove ĉiusemajne merkredon la progresintoj, sub gvido de S-ro Ralph Harry.

Okaze de la Kanbera Jubileo taŭgas rememori, ke Walter Burley Griffin, kiu gajnis la konkurson por la plan-desegno de Kanbero, estis bona E-isto.—Jean Harvey.

● **HORNSBY, N.S.W.:** Kun plezuro ni informas ke je Aprilo 4 fondiĝis E-Klubo en Hornsby. S-ro Keith Bowling inaŭguris la kunvenon ĉe la Hornsby-a vespera liceo, kie

S-ro F. Mueller - Sorau instruas Esperanton. Cestis 16 personoj, el kiuj kelkaj estas lernantoj kaj kelkaj spertaj E-istoj. Ni decidis kunveni je la 1-a jaudo en ĉiu monato en la vespera liceo, Pacific Highway, Hornsby.

Elektiĝis la jena estraro: Prez.: S-ro K. Bowling; Vic.-Prez.: S-ino Wheatley kaj S-ro J. Bird; Sekr.: S-ro V. J. Timmins (73 Alexandria Parade, Hornsby). S-ro Victor Bourlin helpis nin pasigi agrablan vesperon per lumbildoj. Ni esperas pligrandigi nian membraron kaj intencas varbi pli da membroj al A.E.A. (Gratulon de A.E.A. al nia plej nova klubo; sendu gratulleterojn al la Sekretario!)

### 14th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

30 Dec. 1963 to 5 Jan. 1964, Melbourne.

Congress Fee: 1 Aug. 1963: A.E.A. members 25/-, others 30/-; after 1 Aug. 1963: A.E.A. members 30/-, others 35/-. Supporting members: by donation.

Make hotel reservations as early as possible. Send hotel reservations (£2 deposit) and Congress fees to: Congress Secretary, Box 2122T, Elizabeth Street Post Office, Melbourne.

#### First List of Congress Members:

1. Mr. Herbert Koppel (Melbourne) £2 (supporting member)
2. Mrs. Fay Koppel (Melbourne)
3. Miss Amy Godfrey (Melbourne)
4. Mr. J. Ryding (Melbourne)
5. Mrs. E. Ryding (Melbourne)
6. Miss P. Ferguson (Sydney)
7. Mr. M. Leereveld (Melbourne)
8. Mrs. A. Leereveld (Melbourne)
9. Mr. F. V. Taylor (Melbourne)
10. Mrs. A. Taylor (Melbourne)
11. Mr. Daniel Kane (Melbourne)
12. Mr. E. McKenzie (Melbourne)
13. Mrs. M. McKenzie (Melbourne)
14. Mr. W. J. Drummond (Melb.)
15. Mrs. M. L. Drummond (Melb.)
16. Mrs. Iren Fink (Melbourne)
17. Mr. E. P. Crowe (Melbourne)
18. Mr. F. R. Banham (Melbourne)
19. Mrs. F. R. Banham (Melbourne)
20. Mr. K. G. Linton (Melbourne)
21. Mr. P. E. Schwerin (Sydney)
22. Mrs. K. R. Schwerin (Sydney)

Ivan Drimov, kursestro, str. Yor. Zyntibrodski 12, VRACA, Bulgaria, petas korespondadon.

### SCHOOLS AND ESPERANTO

On Saturday, 6 April, at 5.30 p.m., in the Children's Session from 2BL, the children discussed The Topics of the Week: **What Language Should Be Taught in Schools?** Suggestions from letters were: French, Italian, Latin, Esperanto, Chinese, Japanese. Quotations as read:

Palmyra, 15 years old, of Bonville, N.S.W., wrote:

At our school we have an Esperanto Club and I have found that one year's study of Esperanto is comparable to three years of French or German.

After 2½ years of Esperanto I can now boast 8 correspondents from 6 different countries. I wonder how many Australians are able to write to people in countries such as Bulgaria, Czechoslovakia, Poland, the U.S.S.R. and Israel without knowing the native language of the country. This I can do with Esperanto.

In many countries Esperanto is given support from the Government. Radio Poland, for instance, broadcasts regularly on its Short Wave Service in Esperanto. In this country there is a very strong movement towards this international language.

French, Italian and German may all be forgotten through lack of use once you leave school, but with Esperanto you can talk with Esperanto-speakers in any part of the world. How much better you understand them and their habits! Yes, I say compulsory Esperanto should be taught in schools.

Caphareus, 14 years old, of Bunbury, Western Australia, wrote:

When I first started learning French, I made up my mind to become a linguist. But then the work became harder and so I tried German. However, after having now made an attempt at French, Italian, German and Esperanto, I can say that Esperanto is by far the easiest. This language should be taught in schools as well as others if desired.

In summing up the chairman said:

I would say the majority of the votes went to French and Esperanto, with Latin a fairly strong second, and there was a very strong feeling that unless you speak the native language of a country, or you don't speak Esperanto, you may not have

such sympathetic relationships as those in which two friends can speak freely together. — Wolo Guelting, 22 Woodward Ave., Stratfield, N.S.W.

### LA VIA LA GRANDA . . . .

En la Rondo 1/51 menciigis du versoj de Louis Genin ("Ho Ve", poemo en "Belga E-isto"): "La agrablona de la via la kareso . . . . Kaj la viajn la okulojn mi rigardis . . ." En La Rondo 7/51, p. 38 troviĝas "La malsaĝeco via la grandega" (Hamleto, p. 26).

La demando pri tiu duobliga de "la" ne havis eĉon de lingvemuloj. Post studo oni atingas la sekvantan konkludon: ke Zamenhof kaj eventuale Genin influigis de la Greka. Zam. tre bone sciis la Grekan—"Greka lingvo 5" estis notita en lia atesto pri matureco.

En la Novtestamenta Greka la difinita artikolo estas foje ripetita post la substantivo, por enkonduki atribua(j)n vorto(j)n. La efiko estas iom emfaza:

La filo mia la amata; la paŝtisto de la ŝafoj la granda; la patro via la en la ĉieloj; la korto la ekstera; la Dio la farinta la mondon.

Similuza estas ripeto de la rilativo (pronomo) pro emfazo en la Germana: Ich, **der** ich so viel fuer ihm tat (mi, kiu faris tiel multe por li). Wir, **die** wir jetzt jung sind (ni, kiuj nun estas junaj).

En la Greka, Angla, Germana, Franca kaj aliaj lingvoj la difinita artikolo estis origine demonstrativo.—Red.

### ANNA HINTZE

Kun animdoloro ni informas pri la morto de nia kara kolegino en la 30a de Aprilo. Ni kore kondolencas. Nekrologa tributo aperos en la sekvanta numero.

"ZAMENHOF", by Marjorie Boulton, is in the Melbourne Public Lending Library.

**Katona Lajos**, Kossuth 36 IB, Kisdombegyhaz, Hungary: 25-j., filatelisto-instruisto, pri ĉia temo.

Nia Voĉeto: S.A.T. Bulteno por geknaboj. Derrick Faux, 4 Queen St., Chesterfield, Derbyshire. 4/- jare.

## Recenzoj

**Oriento kaj Okcidento:** Georges Fradier. Elangligo de G. D. A. Capp. Eldonis UEA kun helpo de UNESKO, Rotterdam, 1962. 50 p. kaj 8 fotoj. 6 steloj (4 ŝ. Aŭstralio).

Antaŭ kelkaj semajnoj aŭstralia diplomato parolis en Manilo kun du Filipinanoj. Ili asertis, ke Orientano tute ne povas kompreni Okcidentanon. Unu junulo rezonis, ke li pensas hispanlingve, kaj ĉar la hispanoj nur duone okcidentigis la Filipinajn Insulojn, la enloĝantoj ankoraŭ nur duone komprenas landojn, kiuj estas tute okcidentaj, kiel Usono aŭ Aŭstralio. Lia amiko, kiu pensadas en la lingvo Tagalog, plendis, ke lia lingvo ne havas sufiĉan vortprovizon por traduki la penson de okcidentano. Ambaŭ certigis, ke iu, kies lando havas neinterrompitan historion ĝis la Romianoj kaj la Grekoj, konsideras la mondon de vidpunkto malsimila al tiu de homo, kies historio komenciĝis post la alveno de koloniistoj en la 16a jarcento.

La aŭstraliano, kiu estis Esp-isto, preparolis la eblecojn de la internacia lingvo por la interkomprenigo de la Oriento kaj la Okcidento. Li citis sian sperton pri la kompreno de japana penso kaj vivo, kaj pri la penetrado en la mensojn de nuntempaj ĉinoj pere de la gazeto "El Popola Ĉinio". Li klarigis pri la vortaro kaj nuancoj ebligataj de la zamenhofa sistemo. Kiam li revenis al Aŭstralio, li trovis je sia surprizo sur sia skribtablo libreton, kiu pritraktis ĝuste la problemon, kiun li diskutis kun siaj filipinaj amikoj: "Oriento kaj Okcidento".

Tiu libro, unue eldonita en 1959 de la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo, en la franca kaj angla lingvoj, pretendas, ke la Oriento ne estas tiel nekonzata aŭ nekonebla kiel oni ofte asertas. Ĝi priskribas la multajn kontaktojn inter Eŭropo kaj la landoj de la Oriento en la jaroj antaŭ kaj dum la Mezepoko, la rezultojn de la Koloniado, kaj la klopodoj de UNESKO, per ĝia dekjara "Granda Projekto", konigi la literaturon, arton kaj pensadon de orientaj landoj al la popoloj de la okcidenta mondo kaj universe.

La angla kaj franca eldonoj ne estas facile haveblaj en Aŭstralio, kaj

la Esperanta traduko havos apartan intereson por ĉiu deziranta helpi pri popola interkompreno. La stilo taŭgas por traduki la oficialan jargonon de internacia organizo, kaj oni trovos ekvivalentojn de multaj kliŝoj, ekz., "imago" (imaga bildo); "neon signs" (neone lumigitaj reklamoj); "traffic jams" (veturilaj embarsoj); "film shorts" (etlongaj filmoj); "craze" (maniato); "international dialogue" (dialogo inter popoloj); "secretariat" (sekretariato); "audio-visual" (audio-vida). Atentema leganto trovos aliajn malpli kontentigaj. Mankas piednotoj pri neologismoj, kiel "ĉanti" kaj "degni", kaj oni ankoraŭ ne solvis la problemon, kiel traduki "to encourage" (angle), "favoriser" (france). "Helpi", "stimuli", "akceli" estus iufoje preferindaj anstataŭ "kuraĝigi", kiu logike, kaj laŭ normala praktiko, estas uzenda pri personoj. Fine, estas bedaŭre, ke "U.N.E.S.C.O." kaj "UNESKO", "Organizaĵo" kaj "Organizo" aperas sur apudaj paĝoj. Tamen la libreto estas fiere montrinda al kiu ajn internacia aŭ nacia oficisto aŭ ministro.—R.H.L.

"Ĉanti" kaj "degni" estas en E-Fr. Vortaro de Waringhien. "favoriser" (1) favori ion. (2) akceli ion (Albault, Fr.-E. Vortaro).—Red.

**Sennacieca Revuo**, N-ro 90. Ĝia vari-tema enhavo pri sociaj kaj kulturaj demandoj valoras la modestan prezon (5 ŝ.). Malgraŭ ke priskribo pri Aŭstrio iom turisme impresas, ĝi meritas atenton. Evoluismo kaj Kristanismo, La Rolo de l'Ideoj en la Vivo de l'Popoloj, estas raciisme esploritaj, kaj ambaŭ taŭgas prefere por la pli inteligentaj inter ni, dum La Socia Enhavo de l'Jazmuziko tiros al si seriozajn disk-amantojn.

La sprita Schwarz denove plaĉos al multnombra legantaro; Grace Barlow lundone traktas pri Romantiko kaj Realeco kaj—pekas kontraŭ lingva unueco, uzante "Aŭstrala" (-ia).

Neklara poemo de Emba kaj sociatira versaĵo de Grenejo (?).

**La Papalagoj** (blankuloj). Oceania tribestro kritikas la Eŭropan kulturon. Enrich Scheurmann. Tradukis laŭ la Nederlanda F. Faulhaber, kun lia antaŭparolo. 80 p. 0.55 dol. Eldonis Asocio de Labor. E-istoj kaj S.A.T. Recenzo sekvos.

### NOTO PRI P. 208

En la unua paraĝo de la recenzo pri "Provo . . . ." la recenzanto petole kolektis neologismajn esprimojn uzitajn en la verko kaj faris komikan frazon. Ĝi ne estas rekta citaĵo el la verka teksto, nek ekzemplo de la "stilo" de la recenzinto. Se ĝi estus rekta citaĵo, vi trovus citsignojn ("...").

Se neologismo estas fakte necesa, aprobinda, imitinda, ĝi plene rajtas aperi kune kun aro da samrajtaj neologismoj, en ĉiu linio de teksto, se necese. La ofteco kaj denseco de ilia apero neniel gravus. Kiel oni defendus principon de "nur malofta apero" de vortoj pretendantaj uzvalidecon?

Tamen, ne ĉiu vorto en la frazo staras eksterdube aprobinda, kiel efektive bona vorto. La recenzanto nur volis per sia petolaĵo, evidentigi la strangan impreson, kiun donas tiuj vortoj, kiam kune uzitaj.—Red.

### LA PLENA GRAMATIKO

De S-ro V. Sadler (UEA) ni ricevis informon: "La tria eldono estas individua entrepreno. La koncerna persono malsaniĝis, kaj per tio la dua volumo (lastfoje promesita por Novembro 1962) daŭre prokrastiĝas."

En "Nederlanda Esp-isto" (Feb.) aperas alvoko de Ruso, kiu arde deziras la duan kaj trian volumon, kaj petegas por afabla pruonto. (Li transkribis kaj tradukis la unuan antaŭ du jaroj—tiel ame li ŝatas la verkon.) La red. ne komentis, verŝajne ne sciante pri la aferstato. Se li aŭ lia centro havas la sole aperintan volumon, estas strange, ke ĉe li ne levigis demando pri la aper-prokrasto. Supozinde la Rusa malfeliĉulo, neinformita, ankoraŭ batas la bruston, en vana atendo.—Red.

### LINGVAJ RESPONDOJ

La kompleta respondaro de D-ro Zamenhof al multaj demandoj—vera trezoro, nepre havebla verko. Prof-o G. Waringhien redaktis ĝin, kontrolis la tekston kaj aldonis valorajn notojn. Broŝurita 8 Fr. fr. (24 steloj); bindita 33 steloj. Editions Francaises D'Esperanto, 11 rue Paul Vergnes, Marne-la-Vallée, France.

### DISKA KURSO

De la sama eldonejo. La 48 Legadoj pritemas rondvojaĝon de Petro kaj Helena TRA LA MONDO kaj sur la 12 flankoj de la 6 mikrokanelaj diskoj (45 t/m) parolas gesam-oj el 12 landoj. Tiu kompleta kurso konsistas el 7 Libretoj kaj 6 Diskoj. La unuaj 6 libretoj surhavas la 48 legadojn kaj ilustraĵojn. La 7a Libreto enhavas tradukekzercojn, leksikonon kaj indikson. Ĉiuj frazoj estas tradukitaj Francan kun necesaj gramatikaj klarigoj. Lausperte ni povas rekomendi tiujn bonegajn diskojn. Kosto modera. La tuta kurso kostas nur 81.50 Fr. fr. (243 steloj). La 7 Libretoj (135 steloj). La 6 diskoj (120 steloj). E-societoj havas rabaton 25 p.c.

ANDORO, ĉarma Pirenea landeto. Luksa libreto 73-paĝa kun pli ol 60 fotoj. Jean Baquer, trad. Andre Ribot. Sama eldonejo. 8 Fr. fr.

### ELDONEJO "KOKO"

Estas 36 eldonoj listitaj en la UEA-Jarlibro: Ne la plej fekunda, tamen certe merithava, estas KOKO en Kopenhago.

Fondita por eldoni precipe E-originalojn, ĝi nun entreprenas ankaŭ tradukaĵojn. Por "sproni" verkulojn, la kooperativo ĉiujare honoras "aŭtoron de la jaro". 1958: Marjorie Boulton; 1959: Juan Regulo Perez; 1960: Tibor Sekelj; 1961: John Francis.

El ĝia serio: Rozoj kaj Urtikoj (Poul Thorsen), elvendita. Ezopa Saĝo (Kalocsay), elvendita. Homoj kaj Riveroj (J. H. Rosbach), recenzo en La Rondo 9/57. Mistero Minora (F. Szilagyi), La Rondo 6/59. Virino ĉe la Landlimo (Marjorie Boulton), La Rondo 12/60. La Verda Raketo (Jean Forge), "vendata en tempo, kiu koincidas kun la titolo". La Rondo 1/62.

"La Marvirineto" (H. C. Andersen), ĝia jusa eldonaĵo, estas recenzita en nia n-ro 32.

### ERROR

On page 210 "The A.E." at "A.E.A. Adresaro" read after letter B.: "Diploma of the B.E.A. S.:" We regret omission.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 34 (114)

MELBURNO

Majo - Junio, 1963

---

## "THIS LAND AUSTRALIA" IN ESPERANTO

Official Film Widely Distributed

The second official Australian Government film with Esperanto sound-track, "Jen Aŭstralio" (This Land Australia), is being widely distributed and is reaching places where Australian films with English commentary are seldom if ever shown.

On 15th February the Australian High Commissioner's Office in Wellington reported to the News and Information Bureau of the Department of the Interior, Canberra, that, following showings by the New Zealand Esperanto Association, a copy of the film has been placed on indefinite loan with the New Zealand National Library. The High Commissioner's Office added:

"The Supervisor commented that the library has a similar Esperanto film on New Zealand which has proved very popular with Esperanto schools and clubs. Recently the Department of Education issued an instruction booklet and a number of films to schools teaching the language to eleven and twelve year old pupils. Apparently many teachers are using Esperanto as a preliminary language training means, prior to the study of French or German, which commences at thirteen years of age. All round, therefore, there should be ample opportunities for this film to be shown to good advantage".

On 16th April the News and Information Bureau in New York re-

ported that its copy of "Jen Aŭstralio" was being used that month in conjunction with Esperanto exhibits in Puerto Rican libraries. The Bureau attached a letter from the Brazilian Esperanto League requesting a loan of the film. The Bureau continued:

"We had the letter translated and it says, in brief, that the previous Esperanto film AUSTRALIA TODAY was enjoyed by many people in Brazil and that without doubt the new film will find equal acceptance and will contribute to the firming of friendship between our two distant countries."

(La teksto estis: "Mi ĝojas denove manifesti la grandan intereson, kiun vekis ĉe ni la antaŭa filmo "Aŭstralio Hodiaŭ". Pluraj grupoj en Brazilo prezentis la filmon al grandnombra publiko, al kiu ĝi plene plaĉis, ĉar ĝi ebligis la formadon de bona ideo pri via bela lando".)

On 23rd April the New York Bureau forwarded copies of the programme of the Esperanto Club, Rio Piedras, Puerto Rico, in Spanish and Esperanto, for its showing on 24th and 25th April at the University Centre.

The programme explained that the short film "Esta Tierra Australia" would occupy the film exhibition "The Vintage" to be shown in the University Centre. It would be the first time that an Esperanto film had

been shown in the University of Puerto Rico. Various members of the Esperanto Club of the University would give a simultaneous interpretation from Esperanto to Spanish. The programme then gave the following description of the film in Esperanto with a Spanish translation:

### "Jen Aŭstralio"

La 16 mm-a sonfilmo "Jen Aŭstralio" kun klarigo en Esperanto estas produktajo de la filmofako de la Aŭstralia Registaro. Ĝi anstataŭas la esperantan filmon kiu donis informojn kaj plezuron al pli ol 20,000 samideanoj kaj amikoj ĉie en la mondo dum la pasintaj 7 jaroj, "Aŭstralio Hodiaŭ".

"Jen Aŭstralio", same kiel la antaŭa filmo, estas en plena laŭnatura koloro kaj daŭras 25 minutojn. Ĝi prezentas ĝeneralan bildon pri Aŭstralio, enhavante pejzaĝojn, florojn kaj bestojn, agrikulturon, la industriojn de paŝtado, fiŝkaptado, minado kaj fabrikado. Ĝi montras la sportojn kaj ankaŭ kulturajn aspektojn de Aŭstralio. Inter aliaj interesaj bildaroj estas edziĝfesto de indiĝenoj en Nov-Gvineo, tendaro sur la antarktika kontinento kaj la transportado de virŝafoj kaj bovajo per aeroplano.

La komentario esperantigis la Sidneja Esperanto-Klubo kaj S-ro F. R. Banham (Redaktoro de La Rondo "Australian Esperantist"). La elparolinto estas S-ro Ralph Harry, Prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio, kies voĉo estas jam konata al samideanoj en multaj landoj.

A copy of the film is now held by the Canberra Esperanto Club on indefinite loan and is available for showings in Australia or in other countries where it is not obtainable from the local Australian office. Cost of transport must be paid by the borrower. Application should be made to Mr. R. L. Harry, c/o Department of External Affairs, Canberra, A.C.T.

(Ekzemplero de la filmo "Jen Aŭstralio" estas pruntebla de landaj asocioj en landoj kie ĝi ne estas haveblaj ĉe la surloka aŭstralia oficejo. Tiaj asocioj sin turnu al S-ro R. L. Harry, Department of External Affairs, Canberra, A.C.T., Australia. La koston de transporto devas pagi la pruntanto.)

## Australia Kroniko

● **MELBOURNE:** La malvarmo kaj pluvo dum Majo/Junio ne fortimigis multajn klubanojn. Krom la kutimaj klasoj okazis la jenaj prelegoj: S-ro J. Ryding, 29/4 rakontis pri Mount Morgan en Kvinslando kaj montris kolorbildojn. S-ro M. Leereveld prezentis diskojn kun Esperanto-kantoj. Samvespere ni adiaŭis Ges-rojn Fordham, kiuj vojaĝos al Eŭropo. S-ro F. Taylor, 13/5, montris belajn diapozitivojn pri 5-taga veturado al Heron-Insulo.

La 20-a de Majo estis dediĉita al la memoro de S-ino Anna Hintze. Solene pianludis Kim Bastin; sekvis memorparoloj de S-ro E. McKenzie (kiel Prezidanto), S-ro E. Hearne (kiel multjara amiko), S-ro W. J. Drummond, S-ro H. Koppel legis kondolenc-leterojn de la Sydney E-Societo, Ges-roj Schwerin, Ges-roj Holmes (Seymour) kaj de Jim Dimo (Ballarat). Li ankaŭ memorigis la multjaran agadon de la mortinto por S.A.T. S-ro A. Fridenbergs, kiel enmigrinto, rememoris bonkoran helpon. S-ino F. Koppel substrekis la fervoran idealismon de S-ino Hintze, antaŭ ol laŭtelegi kortuŝan nekrologon de S-ro F. R. Banham, kiu pro deĵoro ne povis persone ĉeesti.

S-ino Michaels (japanino) prezentis interesan prelegon kun belaj kolorbildoj pri Japanujo (27/5). Ankoraŭfoje prelegante pri la Poezio, D-ro Fridenbergs montris kiel la nacia lingvo influas la karakteron de la poezio, kun la konkludo ke, kvankam tradukado povas eĉ superi la originalon laŭ belsoneco kaj lingvaĵo, ĝi tamen ne povas reprodukti la saman karakteron kaj potencon. (3/6.)

Bonvena gasto je la 17/6 estis Ges-roj Dean el Perto, kiam S-ro F. Taylor montris diapozitivojn pri bela Hispanujo.

En la aprila kunveno de la Rendevuo, S-ro E. Hanks parolis pri la "Tragedia vojaĝo de Burke kaj Wills". En Majo, denove nia mondvojaĝanto S-ro F. V. Taylor alparolis nin, ĉifoje montrante bildojn pri Francujo kaj Svislando.

● **PERTH:** La 16-an de Majo ni estis gastoj en la domo de Ges-roj Strassberg. 15 liganaj ĉeestis kaj ĉiu

el ili kunportis sian plej ŝatatan gramofondiskon. Estis vera muzika festo. S-roj Hawks kaj Dean dankis Ges-rojn Strassberg pro tiel ĝojplena vespero. Pri "La datreveno de la fondiĝo de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio" parolis S-ro C. Dean dum nia kunveno je la 23-a de Majo.

Gratulon al S-ino Gertrude Pollard, kiu ĵus gajnis la Superan Diplomon de A.E.A.

Nia membro F-ino O. Stremple estas nuntempe en Eŭropo. Ŝi kontaktis Esperantistojn en Skotlando kaj ankaŭ vizitis kunvenojn de la Londona E-Klubo. Du el niaj liganoj baldaŭ forlasos nin. S-ino Hitch vizitis parencojn en Usono kaj S-ino Kruger ekkomencos mondvojaĝon en Oktobro.

● **BRISBANO:** La jarkunveno de la Societo okazis 13/5. Estis elektitaj: Prez.: S-ro K. D. Gunster; vic-prez.: S-ino G. Grant; Sekretario (provizora): S-ro G. A. Grant; kasisto: S-ro G. A. Grant; bibliotekisto: S-ino R. Beck; kontrolisto: S-ro O. H. Behncken.

S-roj Gunster, Behncken kaj Parry komitate verkas novan regularon. Ili kunvenis en la hejmo de S-ro Behncken 20/5 por labori super tiu tasko. La finpreparita regularo estos submetita al frua ĝenerala kunveno.

Frue en la jaro Ges-roj Wyber el Christchurch vizitis nin. Ilin gastigis Ges-roj Beck kaj Gunster. La Nov-Zelandaj amikoj restis en Brisbano nur du tagojn kaj iris norden.

—G. L. Parry.

#### A.E.A. EXAMINATIONS

**Elementary:** Mrs. E. L. Palmer.  
**Superior:** Mesdames G. Pollard, Fay Koppel (honors), Hilda Cooper (honors); Messrs. Ross Robbins, J. Gibson, C. W. Dean, I. T. Maddern.

**Adresaro** de ĉiuj Aŭstraliaj E-istoj estas havebla ĉe K. Linton, 11 Poplar St., S. Caulfield, Victoria, Australia. Alia, pli kompleta, aperos antaŭ la fino de la jaro. Sendu al li sugestojn pri plibonigo.

#### AERPOŝTAJ GLUMARKOJ

65 por 1 ŝilingo. Bluaj, glupaperaj. Vendas ilin Donald Broadribb, 51 Primrose Street, Moonee Ponds, Victoria.

#### ĈE LA TOMBO

Kun mano en mano ni iam kunkuris, paŝante senfinan arb-vojon.  
Nur verdaj folioj jen-jene susuris,  
kun ni dividante am-ĝojon.

Sed juse hodiaŭ mi kuris tutsole,  
senbrue, direkte tra la arbareto;  
kaj fine mi haltis, sen spir', senparole:  
min frontis jam nun via povra tombeto.

Jen kune ni trovas nin, kune denove,  
sed nin reciproke ne vidas.  
Sub tero malvarma vi kuŝas senmove—  
ĉe vi, sola, trista, mi sidas.

Armand Su (Tientsin). El lia preparita E-poemaro: "Sekretaj Larmeroj" (liriko 1957-1962).

#### POR KOMENCULOJ

La malgranda Karlo vidis la unuan fojon sur kampo erinaccon. Baldaŭ post tio li trovis sur strato kaŝtanon, kiu estis ankoraŭ en la ŝelo. Goje li anoncis sian trovitaĵon al la patro per jenaj vortoj: "Paĉjo, imagu nur, kion mi trovis sur strato: erinaccon ovon!"

Sinjoro demandis sur strato fiakriston: "Kiom oni pagas ĝis la stacidomo?"—"Tio ne kostas multan monon. Por vi mi volas kalkuli dek kronojn".—"Mi dankas. Mi volis nur scii, kiom mi ŝparus, se mi piedirus".

Fama kuracisto estis kuracinta infanon dum malsano danĝera. La dankema patrino diris al la savinto de sia fileto: "Mia Dio, ekzistas servoj, kiujn oni ne povas pagi; mi ne scias, kiel danki por via kuracado . . . mi pensis, ke vi akceptos tiun ĉi monujon, kiun mi brodis propramane".

"Sinjorino", respondis iomete malfable la kuracisto; "la medicina scienco ne estas afero de sentoj, kaj niaj flegadoj devas esti pagataj per mono; donacetoj subtenas la amikecon, sed ili ne subtenas niajn domojn": "Sed, sinjoro doktoro", diris la sinjorino, konsternite kaj ofendite, "parolu kaj fiksi sumon"—"Sinjorino, tio estas du mil frankoj".

La sinjorino malfermis la monujon, elprenis kvin bankbiletojn po mil frankoj, donis du el ili al la kuracisto, remetis la tri ceterajn en la monujon, malvarme salutis kaj foriris.

## Recenzoj

**English-Esperanto Dictionary:** Fleming Fulcher and Bernard Long. Third edition. 332 pages. Price 27/6 Australian. Published by The Esperanto Publishing Co., Rickmansworth (Herts.). Order at A.E.A. Book Service.

A thorough revision, brought up to date by addition of some 1000 new terms and translations, based on notes made by the late Bernard Long for that purpose before his death.

**Elingita Glavo:** Originala artikolaro jurnalisma: **Verdiro.** Eldonis Stafeto. 148 p. 1.20 Us. dol.

La stimule vinagraj komentoj de la anonima aŭtoro certe taŭgigas la titolon. Per svinga sabro li precipe drasas la mondfederalismon kaj la financon hegemonion. Ankaŭ aliajn li ekzamenas sub lupeo. Pli-malpli malmilde li kritikis UEA-rilatojn kun Unesko, Sennaciismon, Belamiismon, "denaskan Esperantismon, "verdan" maltoleremon, "neŭtralecon" kaj la internan ideon. Per tio li vekos reagopn, almenaŭ ĉe amaraj recenzantoj.

Li sugestas, ke "la novaj poetoj ne sufiĉe regas E-on, sekve enrudas neologismojn". Nu, fakte troviĝas tre lertaj E-istoj inter tiu poezia skolo, kiu grandparte estas akuzita pri troa "noviĝemo". Kiu kompilis Parnasan Gvidlibron? Krome, homoj kiel Drezen ensvarmigis multajn novvortojn.

La forto de la "interna ideo" estas evidenta en anekdoto pri Brazilano, kiun la aŭtoro renkontis en Parizo. Ili kune parolis E-e. Poste la Brazilano, kiu antaŭe laboris en Usono, ekparolis en la Angla. "Ĝis tiu momento mi sentis nur, ke li estas frat-Esperantisto; tuj kiam li parolis mian lingvon, mi sentis forte, ke li estas fremdulo!"

De sia speco la plej bona verko de post la "Notlibroj" de Sturmer. Revelacioj de malkaŝe esprimema individualisto.

**Latentaj Nombrofenomenoj en la Sankta Skribo.** Gunnar Rugland, Ronnell, Hornsgaten 89, 2tr., Stockholm. 16 p. Sv. kr. 24.

Ĉiu vorto de la Hebrea alfabeto havas precizan nombrovaloron, sekve ideogramo aplikigas al ĉiu vorto en

la Biblio Hebrea, kun konforma instruado spirita. Ekzemple: arbfolio (aleh) egalas: a-l-h 70 plus 30 plus 5 (105). Per la proksima formo de tiuj ciferoj (per moderna, t.e. araba, skribo) oni povas desegni folion. La broŝuro enhavas multajn ekzemplojn. Por homa scianta la Hebrea, la matematikon kaj la desegnoarton, la teksto forte altirus.

Se estas prava la pacienca ellaborado de la aŭtoro kaj liaj kolegoj, la Biblio certe ricevas strange novan valoron por piaj serĉantoj en la kampo de l'nombrosienco. Oni ne plu parolos pri nur la laŭlitereco de la Biblia teksto, sed ankaŭ pri ĝia laŭnombroco!

Sed se la Biblio estas destinita por la kompreno de ĉiuj homoj, saĝuloj kaj simpluloj, kial Dio tiel kaŝsekrete parolos al ili? Diris Ruskin: "Mi estas tute preta ricevi kiun ajn misteron en tio, kio estas revelaciita, tamen ne plaĉas al mi la maniero en kiu ĝi revelaciĝis. La doktrino estas apartena al Dio, sed la ricevo de ĝi estas mia; kaj ŝajnas al mi, ke la kreitoj de Dio, la Lumo kaj la Vero, havas rajton atendi klare kompreblan revelacion koncerne ĉion, kio rilatas al iliaj eternaj interesoj".

Cu vere verkus per enigmoj tiu, kiu (laŭ flabakuk 2/2) ordonis: "Enskribu la vizion...desegnu bone... por ke leganto povu facile tralegi", kaj kiu metas vojon sur kiu "eĉ malsaĝuloj ne eraros" (Jesaja 35/2)? Aŭ ĉu povas esti, ke la Biblio estas la perilo por savi homojn nun kaj eterne, kaj krome provizi ilin per senfinaj rebusoj?

Ĉi tiu verketo de sincera sciamulo ne meritas morti sen eĥoj, sed rajtas atendi la lupeon de homoj kompetentaj ĝin funde analizi.

**La Profeto:** Kahlil Gibran. El la angla tradukita de Roan O. Stone (kunlabore kun Reto Rossetti). 128 p. Unu Us. dol. Eld. Stafeto, J. Regulo, Kanariaj Insuloj.

Vendiĝis ĝis pli ol miliono la Usona eldono de tiu ĉi "la plej glora el liaj multaj verkoj, kiu portis konsolon al miloj" (laŭ respektinda antaŭparolo). La aŭtoro mortis 1931.

Teozofiaj pensoj pri la homa vivo kaj destino, sentence esprimitaj, kvazaŭ de moderna Salomono sub influo de Blake kaj Tagore. Pens-

orientiĝe li oscilas inter la sonĝeca mistiko de la unua kaj la klarprezenta viziado de la dua. La verko okupas lokon apud la samĝenra "Kristana Agendo" (Xavier), forme kaj didakte.

Bibliemuloj nepre ĝin komparas. Specimene.—"Viaj infanoj ne estas viaj infanoj. Ili estas la gefiloj de la Vivo spiranta sin mem. Ili venas per vi sed ne de vi . . . Vi rajtas ŝirmi iliajn korpojn, sed ne iliajn animojn". Tamen, ĉe Sentencoj de Salomono 22/6: Instruu knabon konforme al lia vojo, kaj eĉ maljuniginte li ne dekliniĝos de ĝi.

"Vi vere donas, kiam vi donas el vi mem". Sentencoj de S. 21/3: Plenumado de . . . justeco estas al la Eternulo pli agrabla ol ofero. Hoŝea 6/6: Mi deziras bonfaradon, sed ne oferon. Romanoj 12/1: Prezentu viajn korpojn kiel vivantan oferon. k.m.a.

"Se la amo trovas vin inda, ĝi vian vojon direktos". Psalmoj 37/23: . . . de la Eternulo fortikiĝas la paŝoj de virta homo, kaj lia vojo plaĉas al Li.

Pri preĝado: "Dio ne aŭskultas viajn vortojn, krom se Li mem eldiras ilin per viaj lipoj". Teologie defendebla!

Legajo precipe por homoj introspektaj aŭ transcende - serĉemaj. Tamen ankaŭ animoj malpli rafinitaj trovos en ĝi lume sagacajn observon.

Estas dubinda uzo de "rivel" (P.V.) en senco de revelacii. 17: fandkvartalo (?) internacia de Boston. "Melting pot of races"? fandpoto de rasanoj.

Pro sia sincera animesploro ĉi tiu verko jam ricevis admiran komenton ankaŭ de senreligiuloj.

## EASTER

### The Saviour of the World and Mankind:

Martinus Instituto, Mariendalvej 94-96, Copenhagen F. 75 p. Prezo 14 ŝ. Australia.

Anglalingva traduko de Ed. Ockey el Esp-a traduko de la originala Dana. Bona ekzemplo de E-o kiel pontlingvo literatura.

La aŭtoro pretendas interpreti la veran signifon de la vivo, morto kaj releviĝo de Jesuo, sen konsidero al "kio estas skribita". Sekve li ignoras Biblian kritikesploron. Tute mankas ĉia ekzegezo. Plue, ĉian "mistikismon" li malŝate rifuzas.

Verkis do libranima pensulo, kiu lasas la proprajn ideojn elflui sen bremsado de l'tradicio. Li filozofie situas for de la ĉefflujo de la ortodoksa Kristanismo, interalie pro sia malrekonado de la Peko doktrine konsiderata. Malgrau tio, la spirita instruo de Martinus edifus homojn, kiuj, eĉ koste al siaj propraj kredformoj, volus ricevi helpon kontraŭ la materialismo.

Kelkaj legantoj eble pensos, ke li levas pli da problemoj ol tiujn, kiujn li penas solvi. Ekzemple, li asertas: ke estus mortdangere al Maria se ŝi tuŝus la korpon de la releviĝinta Jesuo en la ĝardeno, pro ĝia transmonde mistera "pulsado" (Joh. 20/17). Modernaj tradukoj donas "ĉesu kroĉtenadi al mi" — ne, "ne tuŝu min". Cetere laŭ v. 27, ok tagojn poste, Tomaso estis invitita tuŝi tiun saman korpon.

La prezo estas alta. La E-a eldono kostas nur 9 ŝ. Aust.

Another example of Esperanto as a "bridge" language. A Polish translation of the Esperanto original "Plant Life" by Dr. Paul Neergaard, Danish scientist, has been published. ("Worker Esperantist.")

## MARKO ZAMENHOF

Laŭ "Vivo de Zamenhof" (Privat) Zamenhof skribis "Mia patro estis ateisto". Vidu: The A.E. p. 162.

H. Z. Maimon atentigas, ke "ateisto" en tiu kunteksto havas ne la gojan (nejudan) sencon, sed la Judan — t.e. ne religiema. Li komentas: "Fakte li tia ĉi estis vizitinta la sinagogon nur dum Jom Kippur aŭ dum solenaj festoj. Ne ortodoksa. Sed nejudoj povus tion ĉi akcepti kiel 'antireligia' aŭ 'liberpensula', kaj tio ne taŭgas."

## NOTED

Only 1.2% of Hindus speak English.

Only 50% of all U.S. diplomats are proficient in any language other than their own.—"New York Times".

Cited in "Interlingvistika Informa Servo", Jens-Due-Str. 25, 328 Flensburg, Germany.

## "COMMONWEALTH"?

The above-named organ used "Brita Komunumo" for this title. See p. 203 The A.E.

## NEKROLOGO

ANNA HINTZE Esperantistigis en 1923, kiam kuŝante en hospitalo, ŝi ricevis de sia frato Norman Grant lernolibron. Ŝi entuziasmis pri la idealo, kaj, dediĉante horojn regule al studado, restis fidela al Esperanto ĝis la vivfino.

Ŝi estis el tia speco, kia konstruas solidan strukturon de idealisma organizo. Karakterizis ŝin dum tri jardekoj neŝancelebla fido al la Afero, fidela partopreno en ĉiu tasko konforma kun ŝia kapablo, senlaca aplikado al alilanda korespondado, kaj konstanta praktiko de Esperanto kiel lingvo amata, lingvo de la ĉiutaga realo.

Ŝi spitis ĉiun obstaklon, kaj senrezerve donis el sia vivo tion, kion ŝi nur povis. Sin daŭre inspiris la nobla Zamenhof. Ankaŭ li devis barakti kontraŭ malforto fizika.

Sia feliĉa personeco prilumis ĉiun klubkunvenon. Pro ŝiaj vojaĝoj al aliaj ŝtatoj, rondanoj ŝin funebras en la tuta kontinento.

Ŝi senhalte skribadis, ne artikolojn, sed leterojn informajn, kuraĝigajn al Esperantistoj en multaj landoj. En tiu frukta laboro ŝi neniam laciĝis. Oni ne trovas ŝian nomon sur paĝoj de prestiĝaj gazetoj; neofte ĝi aperas en nia modesta organo. Ŝia nomo pli daŭre restas, gravurita sur la koro de mil amikoj.

Ni priploras la morton de fidelaj kolegoj. Ĝi dolore ŝirvundas la kordon de nia kara komunumo. Tamen ĉagrenus ŝin penso, ke ŝia morto efikas sur nin pli ol ŝia sindona vivo. Vane ŝi estus vivinta, se ni lasus la manojn fali kaj ne ricevus instigon al pli intensa laboro.

Ŝi testamentis al ni ekzemplon de modesta homo tute dediĉita al idealo pli granda ol unuopaj individuoj.

Por efektive honori ŝian memoron, ni ĉiam rigardu la vivon de tiu brava virino, kaj, freŝe inspire, daŭrigu ŝian lasitan laboron. Tio estas nia tributo, nepre pagenda!

## BOKSADO

"Heroldo de E" (1/5) raportis boksbatalan morton en Gympie (Usono). Devas esti: (Aŭstralio). Ĝi uzis "raŭndo". H. Wingen donas "etapo", kiun cetere ne agnoskas en tiu senclo la vortaro de Waringhien.

## ANGULO GRUMBLULA

Karlo Piĉ, konata stilisto, en Nica Literaturo Revuo informas, ke li ellernis E-on en 1937. Li tiam posedis nur kelkajn numerojn de E-gazetoj, kies lingvaĵo preskaŭ lin fortimigis. Ĝi estis malelasta kodo, maŝino senanima, peza mekanismo, io morta...

Ben-okaze venis en liajn manojn verkoj de Privat, Stojan, Schwarz. Ili ree gajnis lin por E-o, ĉar ili konvinkis lin, ke ILLI estas Esperanto, kaj ne la balasto, idiotaj provoj kaj mizera balbutado de la gazetoj.

Li legis 47-foje "Esprimo de la Sentoj en Esperanto" (Privat) —unu el la plej gravaj libroj en nia literaturo. Ĝi instruis lin pri la stilo pli ol ĉiuj gramatikoj.

En 70 jaroj ni bakis centmilojn da E-istoj, el kiuj restas nur relativa malmulto. Ni dankas tion al fuŝe verkitaĵoj kiel tiuj, kiujn li legadis antaŭ 20 jaroj.

Aliaj homoj jam spertis simile al Piĉ, kaj, kiel li, savis sian E-an vivon per sinturono al bonaj tekstoj. Unu el ili rakontas, ke per feliĉa hazardo trafis sub liajn okulojn tre bonaj tekstoj. Esplorante datojn de ekposedo sur libroj, li rimarkis, ke en 1922 li legis la Novan Testamenton (Rust kaj Wackrill) kaj "Vortojn" de Prof-o Cart; Ifigenio kaj Fabeloj I en 1924; tiam sekvis ĝis 1930: "Nova Sento", bela originalo de Tagulo (Sir Henry Hyams) — kiu meritas represon! — "Princo Serebrjanij" (trad. Maria Sidlovskaja, majstrino inter multaj bonaj Rusaj), ĉiuj tradukoj de Kabe; "Vojaĝo Interne de Mia Cambro" (trad. Meyer); "Portreto" (trad. Fiŝer); "La Reĝo de la Montoj" (trad. Moch), kiu multe plaĉis al nia homo, malgraŭ malfavora kritiko de Cart.

Estas tre grave, ke pliboniĝu la lingva nivelo de niaj gazetoj. Multaj provverkaĵoj de "novbakitaj" maldextoj aperas sub tro indulgaj okuloj de supozinde pli lertaj redaktoroj — kun efiko malesperiga sur novajn legantojn, kiuj cerbumas pri frazoj skribitaj sub influo de nacilingvaj dirkutimoj. Certe, niaj gazetoj ofte malkontentigas kiel instruiloj por lernantoj. Ili estas ĉefe en du klasoj: la landaj organoj, kaj la kulturaj revuoj. La unuaj ĝenerale enhavas timige multe da nemature verkita teksto, ne kompetente kontrolita. La dua — tekstoj tro "alteflugaj", enhave

kaj stilistike. En "Franca Esperantisto", Waringhien juste riproĉas pri Franteritoriaj gazetoj kaj bultenoj, ĉar ili ne sufiĉe kontrolas kontribuaj-ojn, aŭ hezite ŝanceliĝas antaŭ la redaktora devo: forigi erarojn el presotaj manuskriptoj. En iuj aliaj landoj similan kritikon oni povus fari. Ni ne rigore postulas atingon de ĉie-gala stilboneco — nur simplan gramatikalan korektecon, kaj klarsencan esprimon.

Instruistoj do saĝe konsilus intertempe: por progresi en lingva lerteco, lernantoj prefere legu aprobitajn tekstojn de verkintoj, kies stilo meritas vastan imitadon. Poste ili mem kompetentos kritiki konstrueme la malpli bonan enhavon de la pli granda parto de nia efemera literaturo perioda.—Farbo.

### UNITARIANISMO

Unitarianoj au (religiaj) universalistoj: skribu por Esperanta broŝuro al J. Deer, 12946 NE Hancock, Portland 30, Oregon, U.S. Oni fondas "Unitaran Universalistan Esperanto-Societon. La Unitarianisma konfeso liber-kreda similas al la Zamenhofa Homaranismo. Pro teologiaj kialoj ĝi ne povas aliĝi al la Monda Konsilantaro de Eklezioj. (Waringhien en sia E;-Fr. vortaro donas "unitariano, -ismo.")

### WORLD NEWS

The Universal Esperanto Association has published a booklet in English and French, concerning Esperanto, for distribution to African students at universities.

The Chinese People's Republic has published "The Boundary Problem between China and India", with maps and documents.

The Esperanto Museum in Vienna is issuing a 600-page catalogue in June at 32/-.—International Esperanto Museum, Hofburg, Vienna.

101 candidates sat for the Royal Society of Arts examinations in 1962.

### ESPERANTO IN SOPHIA UNIV.

The philological faculty of the State Uni. in Sophia (the oldest in Bulgaria) has accepted Esperanto into its curriculum as an optional subject. Lecturer is Atanas A. Atanasov. The chief city newspapers carried the story.

### "ESPERANTO KAPABLAS ĈION"

Wm. Auld asertis: "Esperanto kapablas ĉion"; en "Esperanto" Jan. 1961 li modife aldonas "ĉiu lingvo estas precize tiel kapabla kiel ĝiaj uzantoj . . ." Li ne estis la unua tiel pretendi. Nekrasov en "Literatura Mondo" Junio 1932 defie kriis: "Esperanto povas ĉion!"

Ĉu do iu kapablas traduki la poemojn de Browning en klare kompreneblan Esperanton? Tio verŝajne estas tiel enigmeĉaj. E-isto, supozinde, "kapablas" nur transdoni la penskaoson en sian propran idiomajn, se li ne sukcesus kompreni la efektivan dirvolon, t.e. la sencon, de Browning. Studu la tradukon de "The Grammarian's Funeral" fare de Ralph Eliott en "Literaturo", Okt. 1922, kaj la deklaro de Zamenhof en la antaŭparolo al la Psalmaro: "Mi antaŭvidas, ke kelkaj legantoj plendos, ke multajn lokojn en mia traduko . . . ili ne komprenas. Tial mi atentigas ilin, ke, se ili volas legi ion 'tre facile kompreneblan', ili ne legu la Psalmojn. Mi donas nur tradukon, sed ne komenton . . ."

En "Malgranda Revuo" N-ro 3, 1951, M. C. Butler, responde al Auld, modere modifas la pretendon: ". . . neniuj lingvoj (eĉ ne Esperanto!) povas ĉion kapabli, Ĉiu lingvo havas proprajn belajojn, proprajn ecojn; en ĉiu lingvo (ankaŭ en Esperanto!) troviĝas aferoj ne tiel bone esprimeblaj en alia lingvo. Oni ne atendu, ke iu ajn lingvo perfekte esprimu ĉiun nuancon de ĉiu alia lingvo."

Esperantist-memfiduloj penu traduki The Six - Gun Galahad ("Time" 30/3/59), Prospice au My Last Duchess (Browning), kaj — televide/radie provu voĉraporti boksatalon aŭ ĉevalkonkurson en Esperanto. Kiam ni povos provizi al servo tiujn lastemciantajn kompetentulojn?

### SUGESTO

Por nekondifena, nelonga korespondado, skribu tekston en Esperanto sur poŝtkarton. Per tio la lingvo fariĝus facile videbla por aliaj okuloj krom tiuj de la adresito. Tiamaniere nia afero pli diskoniĝus. Sufiĉe dirita.

Homaranismo: Waringhien en sia Vortaro difinis ĝin per: movado de-ista, analoga al Socinianismo.

### PHILOLOGISTS SPEAK

Says Finnish professor, quoted in "Espero: Svenska Esperanto-Tidningen": "As things stand today in this our world, nothing other than the planned language can secure free and universal contact of all peoples one with another. From the point of view of the small nations this is of the gravest importance. Were a foreign living language to occupy the ruling position in the life of any small country this would surely bring slow death to the latter's own national culture. Let us not think that the invading foreign language comes as a language only; it brings with it also its culture, for language and culture are inextricably meshed. For this reason the small nations—they above all—should and must plead intensely for the adoption of a constructed language for use in foreign relations."—Professor Paavo Ravila, ex-rector Univ. of Helsinki.

Pierre Naert, professor of Northern Philology in Turku, Finland, 12/62 spoke on "Language and Culture". In detail he presented the linguistic situation today, accenting the injustice of recommending any national tongue as world auxiliary. He concluded that only a neutral planned language can meet the urgent problem, and firmly presented Esperanto as the solution.—Report in "Jugoslavia Espisto". For opinions of other linguists see pp. 188; 166/7 The A.E.

### "ORBITRI"

Amuza ludilo kun 58 kartetoj, kiuj surhavas demandojn kaj respondojn, tiel zorge elektitaj, ke ili donas trafajn kaj ridigajn respondojn je iu ajn el la pli ol 800 diversaj kombinoj. Prezo 5 steloj (3/4p. Australia).

Ontario Press, Oakville, Ontario, Canada.

Kiel vi tradukus: grandstand?  
Traduku: "I have no control over that" per "Mi ne havas decidrajton pri tiu afero". "Self-control"—mem-rego.

El la Plena Vortaro sub Podio: "Planko . . . por loki seĝojn por aŭtoritatojn". Homero dormetas!

### LONGE ATENDITA

La kvara volumo de "Fabeloj de Andersen" (trad. Zam.) nun estas havebla—en bela vesto. 244 p. Samformata kiel la jam eldonitaj volumoj. La lasta neeldonita verko de Z. 53 bildoj. Prezo 3 dol. Usonaj, au 41.70 steloj (ĉ. £1/8/- plus sendkosto 10 p.c. Recenzo aperos.

Mendantoj trovas en ĝi rabatkuponon kun valoro de 2/8. Ĝi validas por aĉeto de la unua volumo, kiu estas presota. Eldonis: Heroldo de Esperanto. Mendu ĉe nia agento.

### "LINGVAJ RESPONDOJ"

De L. L. Zamenhof (sesa eldono) redaktita de G. Waringhien, estas havebla ĉe nia agento.

Cu vi deziras scii, kiel Z. difinis "korto", "folio", "flegi", "varti", "gargari"? Vi eble mirus, leginte liajn komentojn.

Cu li aprobis "iom da la . . ."; "kontentigis tion ĉi"; "post ol"; "tiom voĉojn"; "al ĉi tie"; "scipovi"?

Cu lia frutempa pseudonimo estis "Esperanto" au "Dr. Esperanto"? Tiujn kaj cent aliajn vi legos kun aparta intereso.

### LIFE OF ZAMENHOF

The expanded version of the third edition of Privat's famous biography (157 pages: trans. Elliott) may be had through our agent. Details and review will appear in later issues. Order now.

### ATAKO ANTITABAKA

En "Bulgara E-isto" artikolo kondamnas la tabakfumadon. Subskribis ĝin scienculoj de la Medicina Instituto, Plovdiv. Signifa estas tio, ke en Bulgarujo la tabakeksporto estas ekonomie tre valora enspezo ŝtata.

Cetere, eĉ en kapitalisma Usono The Readers' Digest ne plu akceptas tabakreklamojn. Do en ambaŭ mondpolitikaj "blokoj" tiu industrio perdas amikojn.

**NATURISTA VIVO**, 1801 Page St., San Francisco 17. Artikoloj, fotoj, informoj pri la nudisma mondo. La lingvaĵo bezonas kontrolon: ĉerpas nutraĵojn de rigardi. . . (from looking at); egliso (eklezio); laŭlonge ke ili . . . (tiel longe, kiel ili. . .); seksapelo (sekslogo). Petu specimenon.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 35 (115)

MELBURNO

Aŭg. - Sept., 1963

---

## PATTERN FOR POLICY IN PRESS POLEMICS

Vigilance, Verve and Sound Documentation Necessary.

On the appearance in the press of uninformed references to Esperanto, all Esperantists who can should reply to the editors, putting the matter fairly into perspective and, for any statement they make, have at hand the sources concerned. This is strongly advisable, as any contradiction in defenders' claims obviously must be avoided. If such letters are factually and moderately written, the more of them sent the better.

This, however, should not be left to a handful of active spirits, whose names, appearing with significant regularity, could give an impression that public interest in the question is less widely felt than it is.

Misleading remarks of the ignorant or biased may, if properly dealt with, deliver the enemy into our hands, in that fair-minded editors give space for well-based rebuttals. This gives a rightful publicity obtained only rarely by Esperantists who seek to initiate a discussion in the newspapers.

Recent examples of effective exchange are seen in the case of Independent Television News Ltd. and of "Unesco Courier". Mr. R. Mackay wrote to the former complaining of a deprecatory reference to Esperanto by one of its reporters. Mr. Geoffrey Cox, editor, was "very sorry that unfairness was felt by Esperantists" and promised a reopening of the subject in order that "the case

for Esperanto can be set out". He went on to write, however, that "despite the vigor of its supporters Esperanto has not become established as a language used by the United Nations or any other international body".

Mr. Mackay aptly replied that "when Esperanto is in general use at the U.N. and similar organisations those who have championed it can fold their arms. It is because we know that our objects have not been fully attained that we are still striving for them". He mentioned the recent International Congress of Esperantist Railwaymen in Stoke, which needed no interpreters.

[Seventeen countries were represented by 374 members; the Mayor of Nottingham spoke directly in Esperanto.—Ed.]

In the "Unesco Courier" (March) was a letter from H. van Kuyk, who asserted that he was an Esperantist once, but not now, and then went on to deny the claims of Esperanto. Dr. Lapenna in a letter (published by the "U.C." in June) made the point that an Esperantist is one who "possesses" the international language thoroughly, therefore if he WAS an Esperantist, that is, had mastered the tongue, he should still be in possession of it. Which means, of course, that he cannot be "a former Esperantist", Kuyk's term, and used by him to confuse readers. If, on

the other hand, he has forgotten what little he learned of Esperanto, he was never an Esperantist—having never become proficient in it.

Quoting high authorities, Lapenna goes on to criticise Van Kuyk's contention that "an artificial language is a contradiction in terms". There are, he says, no "natural" and "unnatural" languages. All are products of the societies using them as means of communication. Esperanto, used by an international collective, or "people", is no exception.

Van Kuyk's argument that Esperanto is not viable because it lacks the cultural and spiritual foundations that give to a language its quality of language is of course demolished by a look at the factual situation. Lapenna, after citing the Unesco (1954) resolution that "the results attained by Esperanto . . . correspond with the aims and ideals of Unesco", notes that out of some 2500-3500 tongues, only 40 or 50 have any literature of importance, of which Esperanto is one.

As for Van Kuyk's denial of the capability of Esperanto for general use, it is opposed by the testimony of Leo Tolstoy, who as far back as 1889 wrote that it "fully meets all needs" and that he would do all in his power to further its progress. Meillet affirmed that "all theoretic discussion is vain; Esperanto has functioned".

For full text of Lapenna's letter see "Esperanto" (May 1963).

Not so much what we feel, as what we know, should form the core of our writing to the press. Wishful thinking should not influence our "statistics". Rightly presented, the significance and standing of Esperanto as a social factor provide all we need to clear the mist from the minds of the misinformed and open them to an understanding of the situation.

#### SKRIBAMIKOJ!

**Czechoslovakia:** Bildkartoj kun motiv-poŝtmarkoj: Ivo Boček, str. Fučíkova 3. Šumperk.

**Hungary:** Gazetoj, E-ajoj: Julio Benik, Kis u. 4, Vac.

**Canada:** Sporto, muziko, libroj: (F-ino) Mireille Lagace, 4718 rue Marquette, Montreal 34, Quebec.

## Australia Kroniko

**SYDNEY** (2 Feb. - 22 Julio). Dum ĉi tiu periodo, sufiĉe longa pro mal-sanoj ktp de via raportisto, oni kunvenis regule ĉiun lundon, krom Pasko. En jarkunveno (4/2) oni elektis novan estraron:—J. Matasin, prezidanto; T. Elliott, kasisto; F. Dunn, sekretario; Margaret Hocking, dua sekretario; kaj aliaj. Malgranda ekspozicio pri Esperanto (2/2) preskaŭ tute fiaskis. Pli sukcesa estis societa "Gaja vespero" (2/3) kiam oni kantis, aktoris kaj dancis. S-ro F. Mueller Sorau okazigis en sia hejmo dimanĉan muzikan posttag-mezon (7/4), kio provizis sumon al la kluba kaso.

Okazis diversaj grupaj aŭ partoprenaj programoj. S-ro V. Gueltling dufoje prezentis programon "Vivanta Leksikono" (18/2, 22/4), kaj unufoje "Kiu havas demandon?" (1/7). La programo "Forumo" okazis aranĝe de S-ro F. Dunn (4/3), kaj de S-ro T. Elliott (13/5), kiu ankaŭ aranĝis letervesperon (10/6). S-ro V. Bourlin organizis poemlegadon de la anoj (25/3). Krome okazis "Simpozio pri Maŝintraduko" (3/6), kiun partoprenis ses anoj.

Kelkaj anoj montris kaj preparolis siajn lumbildojn. F-no M. Hocking montris lumbildojn pri Eŭropo (11/3). S-ro T. Elliott montris amason da lumbildoj sub la rubriko "Ĉu vi konas vian landon?" (18/3). S-ro V. Bourlin prezentis dupartan programon (24/6). Unue li montris variajn lumbildojn, kiujn devis preparoli hazarde elektitaj unuopuloj, kaj due li montris parton de lumbildhistorio preparata, "La Marŝo de la Ideoj" en kiu ideovo trakuras la kutimajn embarasojn en nia mondo. S-ro E. Woodruff montris al ni du programojn, "Sudafrikaj naciaj parkoj" (6/5), kun multe da bestoj, kaj "Ferio al Basutolando" (8/7). Tiu ĉi ano venis al ni el Sudafriko, partoprenis niajn programojn, ludis pianon por antaŭ-programa kantado, kaj nun ekziliĝis en Moree por gajni la buterpanon.

Kaj estis ankaŭ la puristoj laborantaj senhelpe de tiaj meĥanikaj apogiloj de la parolfluo. S-ro J. Matasin tiel jesis al la demando "Ĉu mirakloj ekzistas?" (28/2). S-ro V.

J. Timmins raportis pri la kongreso en Romo de la Internacia Katolika Unuigo Esperantista (11/3). S-ro R. Springer eksplikis "Kial mi estas soldato" (8/4), en debuta prelego kaj S-ro V. Guetling, kompreneble, respondis "Kial mi ne estas soldato" (27/5). S-ro F. Dunn parolis pri "Kamboĝo, lando de antikvaj ruinoj, moderna evoluo, kaj pacema politiko" (29/4), kaj pri "La artefarita lingvo Volapuko kaj la gazeto *Kosmopolan* en Sidnejo" (17/6). S-ro F. Mueller Sorau elektis la temon "Spertoj pri libroj" (20/5). S-ro W. Chandler rolis kiel la propra avino por jaluzigi la kantistojn kaj por rakonti pri ŝia "Vojaĝo al Nova Holando" en 1851 de Edinburgo al Melburno sur la malfeliĉa ŝipo Persia (15/7). S-ro S. Drake, reveninte al la grego, parolis pri "Spertoj de amatora verkisto" (22/7).

Iel speciala estis la prelego de F-no Rita van Ryswyk pri Nederlando (1/4), ĉar kaj ŝi nia eks-sekretario, kaj nia ano S-ro Milan Sudec, baldaŭ poste lasis nin por iri al sia hejmlando nederlanda, kie ili geedziĝis.—F. M. Dunn.

**EASTERN SUBURBS Esperanto Club.**—The committee held an enjoyable evening at the home of the president, Mr. S. Milligan, and Mrs. Milligan, of Surrey Hills, on July 5. Several new members were present and the evening passed quickly with stories (both Esperanto and English), music and singing. The "get-togethers" are held on the first Friday of each month, bring old and new E-ists together and help to give confidence to beginners.

The committee thanks the local Eastern Suburbs press, whose publicity has aroused wide interest in Esperanto, and many new students have enrolled. Three new classes are operating, for which we are greatly indebted to Mrs. Fink of Mt. Waverley. The E.S.E.C. hopes to take an active part in the Congress.—(Mrs) B. Smith, 1501 Dandenong Road, Oakleigh (56-5121).

**ROCKHAMPTON.**—Letero de H. V. Petley al "Cairns Post" (6/8) informas pri grupoj en Rockhampton,

Bundaberg kaj Mackey. En Rockhampton, sub aŭspicio de Adult Education Center, pulsas vigla societo, kiu gvidas senpagajn kursojn en Mackay. La letero pledas por E-o, indikante ĝian signifon por la monda situacio, kaj proponante pretan servon de la societo.

### PRI LA INTERPRETADO

Ĉu E-o jam servas kiel interpreta lingvo ĉe gravaj okazoj? Forte impresus al milionoj, se du mondekonaĵoj homoj de nesamaj lingvoj konsentus akcepti servon de E-istoj kiel interpretistoj. Imagu al vi, ke fama Usona kaj fama Ruso, ekzemple sciencistoj, diskutus aferojn ĉe presraporta kunsido. La Rusa E-isto tradukus en E-on la dirojn de sia samlandano; la Usona E-isto tuj tradukus la E-aĵon en la Anglan lingvon.

Tiel same okazus en la kontraŭa direkto. La Usona E-isto tradukus la Anglajn dirojn en E-on, kiun la Ruso tuj tradukus en la Rusan.

Estas certe, ke per la langoj de du lertaj E-istoj, tia eksperimento donus tute kontentigan rezultaton. Kial ne komence provu la aferon ĉe modesta nivelo, dum ni atendas aprobon de pli altaj personoj? Ni kuraĝas diri, ke interparolado inter Kennedy kaj Kruščev pli facile fluus, perile de E-o, ol per tradukistoj kies unu lingvo el la du ne estas la gepatra.

Pri tre interesa eksperimento vidu: La Rondo, Junio, 1947; Franca E-isto, Jan., 1947; La Revuo, Vol. 5, p. 421.

### ZAMENHOF PHOTOS

Henk Thien (Uiterwaardenstraat 12, Amsterdam) long felt that the available photos of Zamenhof in circulation were too well-known and lacking variety, and that there must be many others privately held. So he set out to gather as many as he could by correspondence and visits. His collection now consists of 260 photos, a list of which has been published by the Centre of Esperanto Documentation (U.E.A.)—CED/INT 15.

Some of these new photos have been used for the third edition (expanded) of Privat's "Life of Zamenhof" (Esperanto Press, Oakville, Ontario).

## 14th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

30 Dec., 1963, to 5 Jan., 1964, Melbourne.

Congress Fee: A.E.A. members, 30/-; others, 35/-; supporting members by donation; students, 5/-.

Make hotel reservations immediately (£2 deposit per person). Send all communications to: Congress Secretary, Box 2122T., Elizabeth Street Post Office, Melbourne.

## Second List of Congress Members:

23. Mr. G. F. Cooper (Hobart)
24. Mrs. H. Cooper (Hobart)
25. Mr. E. E. Thompson (Melbourne)
26. Miss V. Cox (Melbourne)
27. Rev. C. C. Cowling (Melbourne)
28. Mrs. E. E. Thompson (Melb.)
29. Miss E. Styles (Melbourne)
30. Mrs. I. T. Maddern (Morwell, Vic.)
31. Mrs. E. Maddern (Morwell)
32. Miss M. Maddern (Morwell)
33. Miss D. Maddern (Morwell)
34. Miss Ph. Maddern (Morwell)
35. Miss B. Williams (Morwell)
36. Mr. F. Mueller-Sorau (Sydney)
37. Mr. Roy Rawson (Melbourne)
38. Mrs. F. Rawson (Melbourne)
39. Mr. E. Chandler (Sydney)
40. Mr. R. Mullins (Melbourne)
41. Mrs. P. Neale (Tongala, Vic.)
42. Mr. S. Neale (Tongala, Vic.)
43. Mr. H. Long (Sydney)
44. Mrs. H. Long (Sydney)
45. Mrs. M. Bedwell (Manly)
46. Dr. C. Caldera (Perth)
47. Mrs. A. Douglas (Hobart)
48. Mr. I. Grahovac (Melbourne)
49. Mr. H. M. Cohen (Melbourne)
50. Miss L. Samblebe (Melbourne)
51. Mr. J. A. Baines (Oakleigh)
52. Mr. V. Gueltling (Sydney)
53. Mrs. A. Sedgley (Perth)
54. Mr. A. Fridenbergs (Melbourne)
55. Mr. O. K. Mitchell (Melbourne)
56. Mrs. O. K. Mitchell (Melbourne)
57. Miss E. Godfrey (Melbourne)
58. Mr. S. Milligan (Surrey Hills)
59. Mrs. I. Milligan (Surrey Hills)
60. Mrs. J. Samblebe (Melbourne)
61. Miss G. Fink (Mt. Waverley)
62. Miss M. Fink (Mt. Waverley)
63. Mr. P. Fink (Mt. Waverley)
64. Mr. I. Slavoff (Melbourne)
65. Mr. C. P. Winchcombe (Adelaide)
66. Mrs. V. King (Melbourne)
67. Mrs. E. M. Hill (Melbourne) £2, Supporting member
68. Mrs. M. Sanders (Ashwood)
69. Miss M. F. Sanders (Ashwood)

70. Mr. L. N. M. Newell (Adelaide)
71. Mrs. A. Newell (Adelaide)
72. Mr. J. Davidson (Penrith, NSW)
73. Mrs. A. Davidson (Penrith, NSW)
74. Mrs. M. Duncan (Manly)
75. Miss A. Longson (Perth)
76. Mr. J. Matasin (Sydney)
77. Mrs. E. Matasin (Sydney)
78. Mr. A. Edmunds (Mt. Waverley)
79. Mrs. J. Edmunds (Mt. Waverley)
80. Mr. E. C. Tronerud (Melbourne)
81. Mrs. M. E. Tronerud (Melb.)
82. Mr. M. Forster (Melbourne)
83. Mr. L. C. Willis (Sydney)
84. Mrs. L. C. Willis (Sydney)
85. Mrs. I. A. Thomas (Oakleigh)
86. Mrs. E. Stafford (Chadstone)
87. Mrs. A. Paling (Melbourne)
88. Mr. M. Mase (Melbourne)
89. Miss M. McKenna (Melbourne)
90. Mr. H. Smith (Melbourne)
91. Mrs. V. Fraser (Redcliffe, Q'ld.)
92. Mrs. M. Parbery (Grafton, NSW)
93. Mr. R. Parbery (Grafton, NSW)
94. Mr. I. Krevniuch (Adelaide)
95. Mr. F. Franjic (Sydney)
96. Mr. S. L. McLochlan (Syndal)
97. Miss F. Smith (Sydney)
98. Mr. I. Heldzingen (Melbourne)
99. Miss S. O'Dwyer (Glen Waverley)
100. Mrs. M. B. Smith (Oakleigh)
101. Mr. N. Parsons (Glen Waverley)
102. Mrs. J. Parsons (Glen Waverley)
103. Mr. P. Priestley (Mt. Waverley)
104. Mrs. D. Priestley (Mt. Waverley)
105. Mr. J. Thompson (Melbourne)
106. Miss R. Frost (Melbourne)

State Distribution: Victoria 75, N.S.W. 20, South Australia 4, Tasmania 3, West Australia 3, Queensland 1.

## Junaj Esperantistoj atentu:

La jaro 1963 estas la jaro de la Esperanto - Junularo. Ankaŭ A.E.A. deziras fondi Junul-Fakon kaj aranĝi fakkunvenon dum la venonta tut-aŭstralia kongreso. Se vi estas ne pli aĝa ol 25 jaroj bonvole kontaktu: Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne, Vic. Faru sugestojn kaj, se eble, aldonu adresitan respond-koverton.

## BOB MATHIAS REPLIES ON OLYMPICS

The Tokyo Games and Esperanto.

June 6, 1963.

Dear Ralph,

I think your idea of a common language is an excellent one not only for sports such as the Olympic Games but for all sorts of international problems that arise because of the language problem. I've been to many places on sport tours and it is indeed a handicap in foreign places in not knowing a common language.

I would think the Japanese would be interested in doing something with Esperanto during the next Games. It would be a good trial program with it and one that would help make the Games much more enjoyable, I'm sure.

I hope to make the Games next year. I stopped by Tokyo on the way back home from the Philippines and they are certainly doing lots of work on facilities there.

I would certainly endorse anything that has to do with the Games and Esperanto.

I hope this letter finds you well.

Sincerely, BOB MATHIAS.

Estas bonega via ideo pri komuna lingvo, ne nur por la sporto, kiel la Olimpiaj Ludoj, sed ankaŭ por ĉiaj internaciaj problemoj kaŭzigitaj de la lingva diverseco. Kiel sportisto, multajn lokojn mi vizitis, kaj bone konas la malfacilon, esti en fremda lando sen komuna lingvo.

Mi inklinas pensi, ke la Japanoj interesus eventuala uzo de Esperanto dum la venontaj Ludoj. Se ili efektive uzos ĝin, tio estos utila provo, kiu certe igos la 18-an Olimpikon pli ĝinda.

Mi esperas ĉeesti la Ludojn en 1964. Revene de la Filipinaj Insuloj, mi haltis en Tokio; en la urbego oni grandskale laboras, speciale preparante faciligajn aranĝojn. Kore mi aprobus kiun ajn paŝon favoran al la Ludoj kaj Esperanto. — Sincere, Bob Mathias.

## FUNDAMENTO DE ESPERANTO

Naŭa eldono kun Enkondukoj. Notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro A. Albault, baldaŭ aperos.

## Alvoko de Japanujo antaŭ la 18a Olimpiko en Tokio LERNU KAJ PAROLU ESPERANTON!

Tre estimataj samideanoj!

La 18a Olimpiko havos lokon en Tokio en la jaro 1964. Tiam multaj homoj el la tuta mondo vizitos Japanujon, kaj ni Japanaj esperantistoj forte deziras trovi inter ili multajn esperantistojn.

Ni varme akceptos ilin kaj povos havigi por ili ŝancon viziti diversajn vidindaĵojn aŭ prizorgi pri ilia travivado.

Bonvolu transdoni nian deziron al la koncernanta aŭtoritatularo en via lando, konsilante praktikadon de la internacia lingvo Esperanto.

Via favora agado pri ĉi tiu afero povus kaŭzi enkondukon de Esperanto kiel unu el la oficialaj lingvoj en estontaj Olimpikoj.

Laŭ la decido de la 48a Kongreso de Javanaj Esperantistoj, ni, la prezidantaro, reprezentante la kongresanojn, subskribas: Ter Isiguro; Rihej Nomura; Masajosi Fukai.

Tokai Esperanto - Ligo, Syowa - ku Tohata-tyol-51, Nagoya, Japanujo.

## NI UZU LA SAMAN NOMFORMON

En diversaj tekstoj oni vidas, ke estas uzataj kelkaj radikoj por nomi la Olimpiajn Ludojn: nome, Olimp', Olimpi', Olimpiad', Olimpik'. Tio nur povas ridindigi nian lingvon. Ni do nepre strebu al termina unuecigo, kaj ne lasu nin aperi antaŭ la granda publiko kiel homoj, kiuj ne interkonsentas inter ni pri ofte uzataj kaj komunaj vortformoj.

Iuj bonekonataj vortaroj enhavas nur "Olimp'" kaj nepre bezonas revizion per pli ampleksa difino. Sekvu la konsilon de du tre bonaj kaj modernaj vortaroj: la E - Fr. de Waringhien kaj la Fr. - E. de Albault: Olimpiaj Ludoj aŭ Olimpikoj.

Olimpiado (la kvarjara intertempo inter la Olimpiaj Ludoj).

Olimpo (Greka monto nordlanda: loko de la mitaj dioj).

Olimpio (Greka urbo).

Hans Wingen kaj Butin/Sommer donas nur "Olimpiado" en ambaŭ sencoj: la intertempo kaj la ludoj mem.

## Recenzoj

**Ombroj de la Kvara Dimensio:** Edwin de Kock. Eld. Stafeto. 159 paĝoj. 1 Uŝ. dol.

De Kock, blanka Sud-Afrikanano, vivante surrande de rasisma infero, serĉas filozofion taŭgan por nia krize turmentata tempo. Animpelate, li iras en la senfinan vaston de la kosmo kaj la eterneco. Kun Auld, Francis k.a. li apartenas al la "kosmeca" skolo de l'poetoj. Lia nefinita "La Konfliktado de la Epokoj" epopee modeligis laŭ la granda skalo de la Milton'a ĉefverko, kaj en ĝi ingrediencas ankaŭ ia "Fausteca" enigmeco, esprimita tamen per impresoj riĉaj frazelementoj. Espereble li finos la imponan verkon, por poste regali la sentojn kaj ekzerci la rezonadon de nia literatura elito.

El 61 poemoj ni aparte mencias: Mateo 25: 41/45: en kiu li galmoke imagas revenon de Kristo ("la bruna") al Sud-Afriko—por renkonti bastonbatojn sur la jam cikatrigitajn kapon kaj pojn.

Verŝajne multaj vidas en ĉi-libro nur cerbo-ludon de malnormala pensoj: Ni preferas vidi en li homon, kies sana malkontenteco pri ĵusnunaj respondoj al la malbeloj de l'vivo senindulge pelas lin serĉspori la limojn de sia vastega imag-tereno. Vestinte siajn konceptojn, li sin montras kapabla, streĉi kaj fleksi la esprimeblojn de Esperanto ĝis admirinda grado.

Estante verk-elitulo, Marjorie Boulton faris simpatian antaŭparolon, kiun mendintoj ofte relegas.

**Erna. Originalo por infanoj,** de B. M. Slosser-Bresler. Eld. I.K.U.E. Dordrecht, Nederlando. 52 p. 6 steloj, Nic. Beetstraat 146, Heerlen, Holland, au per U.E.A. Agentoj, notu.

Bona ekzerca legaĵo ankaŭ por komenculoj. Malriĉa knabineto, post akcidento, resaniĝe restas en arbara regiono, kie ŝi havas interesajn spertojn kaj aventuron. Bona papero, fortika kovrilo.

Ĝi rajtas preni lokon apud la konata porinfana verketo de Privat, nome "Karlo".

**Nova Civito:** dumonata revuo en Esperanto. El mondrigardo Romkatolika, ĝi enhavas artikolojn pri la

primitiva Kristaneco kaj antikva paganeco, ankaŭ pri la Mezepoko, kune kun aliaj pri la signifo de la religio al la moderna socivivo. Multe ilustrata per fotoj. Via della Scrofa, 14, Rome.

**Sipestro Rakontas:** El la marista vivo originale verkita de Kapitano F. T. Lundquist. Eld. la Eldona Societo Esperanto, Malmö. 76 p. Prezo 15 steloj, broŝ., 24 bindita.

La aŭtoro estas 80-jaraĝa E-isto, kiu komencis sian maristan vivon en 1896. La verketo estas valora, ne pro aparte sensacia enhavo, sed pro intima enrigardo en la animon de brava viro, kiu rakontas pri la tempo de la jam forpasintaj velŝipoj. Oni kvazaŭ sidas kun li ĉe kamenfajro kaj absorbas liajn rememorojn de longa marvaganta vivo. Mankas ĉia peno trovi la signifon de aventuroj, pri kiuj li atestas kun la evidenta modero de honesta raportanto. Al ĉiu amanto de la marveturado, precipe per la famaj "kliperoj" aŭ "tranĉantoj" la legaĵo ĉiel kontentigus, se la prezo ne estus tiel alta.

**La Papalagoj** (Blankuloj): Trad. F. Faulhaber. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo. 0.55 dol.

Misiisto E. Scheurmann gajnis la konfidon de Oceanio tribestro, kiu naive sed simplasage esprimas opiniojn pri la Eŭropa kulturo, kiun li forte malestimas. E.S., kontraŭ intenco kaj volo de la insulano, tradukis Germanen la notojn al li konfiditajn, kaj per tio rezultigis libreton, kies 80 paĝoj donas al ni "kvankam ne kompletan, tamen ne malĝustan bildon" pri nia Okcidenta kulturo. Esence la verko alvokas al Oceanianoj sin liberigi de Eŭropaj "lumportantoj", kiuj faras eraron, penante "beni" Polinezianojn per sia propra kulturo kaj moraro. Sendube la tribestro Pacifika reprezentas per sia kondamno la sentojn de pli-malpli primitivaj homoj en ĉiu mondparto en kiu la indiĝenoj nun strebas al memregado kaj liberigo el koloniismo.

### TRANSLATION COURSE

For those who can write a letter correctly in Esperanto. Twelve lessons a year; 15/- subscription. Apply Editor.

**Adresaro de la Kristana Esperantista Ligo Internacia:** 1963. Leyweg 303, The Hague. 63 paĝoj de adresoj de homoj celantaj disvastigi la internacian lingvon inter Evangeliaj kristanoj, kaj la Evangelion tra la mondo pere de Esperanto.

**"Okcidentgermana Esp. Revuo"**, tut-Esperanta, informas pri tiu ŝtato, arte, ekonomie, religie, kulture. Paragrafoj, bildoj pri kuriozaj aferoj de la socia vivo, krom paĝo literatura. Bona lingvaĵo, lerte redaktita. Limburg/Lahn 625, Postfach 180, Germany.

**"Manly Parolas"**—gazeto de la klubo en Manly (N.S.K.), 4-paĝa, bele presita. Ĉe Mrs. B. Cooley, 27 Waratah St., Harbord, N.S.W., Australia. Nia redakcio ne ricevis ekzempleron. (Laŭ raporto en "Heroldo de E.")

#### STORY OF A MSS.

The fourth volume of Andersen's Fables, translated by Zamenhof and published by "Heroldo de Esperanto", was prepared for printing as from 1939. The whole book was set up in Antwerp and the proofs were corrected by Lidya Zamenhof, when the war broke out. The type was guarded in the printery during the whole of the occupation period, but in the last days of the conflict Antwerp was bombarded by V2s. One of them struck the printery and destroyed it together with the type setting. Happily Mr. M. Jaumotte succeeded in saving the printer's proofs, and this action enabled the book to appear.

(From "Heroldo de Esperanto.")

#### EKLEZIA TERMINARO?

En "Unua Stupo" (Tolstoj: trad. Anna Ŝarapov, 1912) la aŭtoro distingas inter "Kristismo"—"la Krista doktrino en ĝia vera senco", t.e. la moralaj instruoj de Jesuo—kaj "Kristanismo"—la teologia kredsystemo. Multaj homoj, li asertas, "ekstermaniere akceptas la Kristanisman, sed ne praktike akceptas, do nek obeas la Kristisman".

Ni bezonas eklezian terminaron, kompilitan interkonsente de reprezentantoj de la diversaj konfesioj. R. Haferkorn mencias tri verk(et)ojn en

sia bibliografio, kiuj cetere ne multe helpus al ordinaraj E-istoj... "La Eklezia Revuo" en 1920 penis starigi liston de vortoj ĝenerale akcepteblaj de Anglikanoj, sed ĝia negranda laboro atingis nur rondeton kaj jam de longe forgesigis. Vidu: La Rondo, Augusto 1947, p. 40.

#### JAPAN TODAY

For over 30 years East and West have met in the pages of "Oomoto", a Japanese Esperanto review. Read straight from the pens of Japanese themselves articles on the cultural and social life of their land and people, together with opinions and comment by European Esperantists. 9/yearly. Stamp will bring specimen copy from F. R. Banham.

#### VALUED REPRINTS

Editions Francaises D'Esperanto, 11 Rue Paul-Vergnes, Marmande (Lot-et-Garonne), France, have the copyright of the chief works of Zamenhof. "Lingvaj Respondoj" has already appeared and The "Fundamento" (five languages) should now be ready. Before the end of the year it is hoped to present de luxe editions of "Hamlet" and "Marta". Order through agent.

#### VIVANTA LINGVO!

Esperanto certe vivas  
Mi asertas sen memfido:  
Se ne vivus nia lingvo,  
Ne kapablus naski "Idon".

—"Pola E-isto" 9/62.

#### BJORN COLLINDER

Emeritus Professor of Finno-Ugrian Languages, Uppsala University, he gave the following paper at a public address on 24 July, 1963, at the Australian National University, Canberra.

In an analysis of the world language problem, he stressed the difficulties of scholars, remarking that Japanese students lose much time learning European tongues that should be devoted to their sciences, and that Americans, through faulty acquirement of foreign texts, are often misguided in their research.

The state of affairs worsens in every sphere, social, cultural and political.

Dealing with English, he was emphatic that it is not easy, but very difficult, because it is so rich and irregular. His experience had taught him that French, German, Finnish, Hungarian, Lappish or Latin were more readily acquired. He began to learn English in 1907, served in English-speaking countries for 18 months and wrote 7 books in English, but has not yet mastered the language.

English is difficult because there are so many features that cannot be brought under rules—thousands of idiomatic expressions present stumbling-blocks to foreigners. English might be easy to learn if one meant "sailors'" or "tourists'" English, but this is not the degree of mastery needed among educated people.

English gained ground because of the vast influence of the English-speaking nations, but there is a limit to this. He cited the recession of French, giving the causes, and implied that similar difficulties confronted English.

Those who learn English as a second language in school may become fluent in it, but few would feel qualified to dispute with an adversary who can use all the resources of spontaneous eloquence and extemporised wit against them. Here he pleads for true equality in the lingual field.

He goes on to discuss the claims of classical Latin for general use and dismisses them as impracticable. Simplified Latin, reinforced by German roots, leads logically to Esperanto, the structure of which he then illustrates. In conclusion he gave a picture of the position and status of Esperanto in the world, named it an effective solution and urged his hearers to learn it.

(Full text from Mr. N. Gamble, Canberra.)

#### ESPERANTO WORKS!

I write this in English, as I think it is of primary interest to non-Esperantists and beginners—we older Esperantists have many such experiences.

Recently Prof. Bjorn Collinder from the University of Upsala in Sweden visited the Melbourne University as the guest of Prof. Max-

well, and there delivered a lecture on "Old Germanic Verse".

As Prof. Collinder is a very well known Esperantist and, incidentally, a member of the Honorary Patronal Committee of the Universal Esperanto Association, a small band of Melbourne Esperantists including myself were present on that occasion to hear the lecture.

It was soon very evident that the professor was a veritable authority on the subject, but at the same time it was painfully apparent that his lack of command of the English language was preventing him from giving us the full benefit of that knowledge. Even when the lecture was finished and he was standing at the door, chatting with members of his audience as they departed from the lecture room, he was obviously embarrassed in his search for English words, until it was the turn of one of our little band to be greeted by him, when, of course, the medium changed from English to Esperanto. What a transformation! The genial professor now became gloriously fluent, and it was with obvious reluctance that he changed back to English as the next person came before him.

As there were six of us present, this unrehearsed demonstration of the practicability of the international language was frequent enough to be more than obvious to all those present.—Ken G. Linton.

#### AMSTERDAM UNIVERSITY

On October 26, 1962, there took place the first **doctoral** examination in which Esperanto was taken with the subjects. Mrs. Vetter-Boot (Romance Languages and Literature) was examined in French and literature as chief subjects, with Esperanto as first and Provençal as second complementaries. The examinations in the complementaries are of equal value, but only one is postulated in the final. It is thus named the **first** complementary.

Details in "La Praktiko" 12/62 and "Nederlanda Esperantisto" 5/63. Mag. S. Pragano is lecturer in Rumanian language and literature and Esperanto at the University.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 36 (116)

MELBURNO

Sept. - Okt., 1963

---

## THE WORLD LANGUAGE PROBLEM

By Dr. Bjorn Collinder, Professor of Finn-Ugrian Languages at Uppsala University, one of the most famous linguists of our day, was recently in Canberra. His article, part of which is translated below, appeared in a Swedish educational gazette.

Humanity is still under the curse of Babel. Many have not noticed how hurtful to us, and unworthy of us, is that confusion. They have not sufficient imagination to visualise a better state of things.

In Sweden the idea is widespread that the problem of international comprehension could be solved by everybody's learning English. I believe, however, that this notion is less widespread in the English-speaking world itself.

Its advocates usually assert that it is easy to learn. There is some truth in this. The so-called "sailor" English by which one may find one's way in foreign ports is quickly learnt, but if one wishes to read English books one sooner or later—possibly after years of study—will become aware that the English word treasure is inexhaustible. To speak English well enough to validate one's opinions in debate with Englishmen or Americans is an art mastered by only a few of those Swedes and others who proclaim so dogmatically that English must become the world language. And few Swedes can write anything in English so well that it should be printed. Even specialists who have devoted their life to the study of English must leave to an Englishman the checking and correcting of their work before sending it to a printer.

English is very difficult to learn; in practice it is impossible for anyone to learn it thoroughly who has not lived for years in an English speaking medium.

Some pleaders for English affirm that it is not necessary to learn it perfectly: it is enough that people learn it to the point that they may make themselves understood. But note here! A great part of international relations consists of conferences and debates in which interest is opposed to interest, opinion to opinion. Even in the home field one prefers to appoint as representatives such men as have a ready tongue straightway to refute or defend, who do not hesitate, stutter or mishandle their language, or make slow and unimpressive reference to notes or prepared manuscripts.

Add to these disabilities the handicap of using an unfamiliar language and one may assess the slight chance such pleaders at an international conference have against opponents who are at perfect ease in their own mother tongue.

The Swedish advocates of English would, for the most part, find themselves in deep water if they tried to put their doctrine into effect, though many of them may have studied English for decades.

The correct pronunciation of English, choice of words and correct word order are full of subtleties almost unmanageable by the foreigner, yet so saturated in sense-values for the Englishman or American that every deviation from them either painfully impresses him or tempts him to laugh. The thought that English, as an interlanguage, could be misused by the world's peoples has little attraction for the English themselves, and, for other reasons, the thought is no more attractive to French, German or Russian. To these it would be intolerable if their tongues were thrust aside in favor of English. And such a "solution" would be unjust in the extreme.

The world needs a language rationally devised which conserves the Latin-Greek word treasure already international and which is so regular and simple that anyone can learn it in the people's schools. Happily there is such a language. It has been used by its adepts for 75 years in almost every country and has a wide literature, both original and translated. It has abundantly proved its practicability and power to live. Tests have been made that prove its ability to reflect all the nuances of thought necessary to international relations. In numerous congresses lively discussions and impassioned debates have been carried on in that language and many people have used it with impressive eloquence.

If the world were not governed with such little wisdom Esperanto would by now have been introduced into the schools of the world, and the problem would have been solved in fact. That such has not been so is due largely to lack of good will. When the question of Esperanto was raised at the League of Nations the French Government sabotaged a positive solution because it feared that Esperanto would displace French as the language of diplomacy.

Most opposition, however, stems from ignorance and prejudice, and it is regrettable that many linguists—not all, by any means—have had a hurtful influence. Some philologists approve of Esperanto in principle but point to supposed defects of detail that they feel should be reconstructed. I have carefully examined such criti-

cisms and with regret must mark them down as negative and hurtful, though often given in good faith. (1).

All languages have imperfections, Esperanto not excepted. But those who regard it as the failure of a dilettante are wide of the truth. It is the work of genius by a richly endowed philologist who offered the better part of his life to the inventing, forming and perfecting of it. After a close examination (1) of Ido, Occidental, Novial and Latino sine flexione, I am justified in asserting that they are all inferior. Ido is only a dialect of Esperanto, Occidental is more easily understood without study than Esperanto by those who have mastered French, English and German, but it is certainly much more difficult to write. And if either Novial or Esperanto is to be branded as dilettante, it will not be Esperanto.

How is the problem to be solved? I answer: "It is already solved. The problem henceforth is to get the solution accepted by those in the seats of the mighty."

- (1) See for example his series of radio talks N-rs 14-15 Esperanto Biblioteko, published by Muusses, Purmurend, Holland. Text in Esperanto.

### BAHASA INDONESIA

In an article Dr. A. H. Johns, senior lecturer in Indonesian at Canberra University College, comments as follows:—

This national language has been consciously and deliberately developed as such since 1928. It is based on Malay, but has drawn on the regional and European languages in the course of its growth. Within the 30 years of its conscious development, Bahasa Indonesia has made astonishing progress, successfully absorbing a wide variety of foreign elements, undergoing syntactical changes but preserving its own structural identity. It has become an extraordinarily fine and sensitive medium of artistic expression. Psychological analysis and the presentation of the stream of consciousness have been used successfully in modern Indonesian novels, and translations have been made from western works, including classics in both poetry and prose.

★ ★ ★

Now, to students of language we ask: In what does this differ in essence from Esperanto, often reproached for its "artificiality"? Here we have a tongue "consciously and deliberately developed" in the space, not of 75, but of 35 years. It is based on Malay, and enriched by regional and European elements; Esperanto is based on Latin, and similarly reinforced by analogous accretions.

Dr. Johns says Bahasa Indonesia is the effective language of administration and communication over an area larger than Europe, divided among some 300 language groups. Potentially, Esperanto if fit, able and ready to cover the world with ten times that number of tongues, and to meet every requirement of the human spirit.—Editor.

## POR KOMENCULOJ

Iun tagon, la oratoro Demosteno provis altiri la atenton de la Atena popolo al gravaj demandoj, sed ne sukcesis. Tiam li ekhavis la ideon komenci la sekvantan rakonton:

Junulo luis azenon por iri se Ateno al Megaro. Estis varmega somera tago. Ĉirkaŭ tagmezo, kiam la suno brilis per sia plena forto, la mastro de la azeno kaj la vojaĝanto haltis kaj komencis disputi: Kiu el ambaŭ rajtas profiti la ombron, kiun donis la korpo de la besto.

"Mi luigis al vi mian azenon kaj ne ĝian ombron", diris la unua.

"Ne", kontraŭdiris la alia, "mi faris negocon pri la tuta besto".

En tiu momento Demosteno rompisan rakonton, kaj la amaso, vive interesita, postulis per laŭtaj krioj la daŭrigon kaj la finon de la rakonto.

"Nu, kiel nesaĝaj vi estas!" ekkriis tiam Demosteno; la ombro de la azeno interesas vin tiel tre multe, sed kiam mi parolas al vi pri viaj plej karaj interesoj, vi apenaŭ konsentas min auskulti!"

La Atenanoj komprenis la lecionon, sed ili neniam eksciis la finon de la rakonto.

Elstara Greka civitano invitis al tagmanĝo siajn amikojn. Inter ili estis ankaŭ Diogeno. Dum la tagmanĝo sentalenta muzikanto ludis

harpon. La gastoj ne estis kontentaj kaj enuis. Diogeno tamen esprimis sin flate pri la muzikanto kaj lin laŭdis. "Ĉu vi ne komprenas, ke li estas malbona muzikisto?" diris unu gastoj.

"Mi laŭdas lin", diris Diogeno, "ĉar, kvankam sentalenta, li ne iras ŝteli, sed persiste praktikas la muzikon".—El "Bulgara E-isto".

Sinjoro eniris lifton en kiu staris kelkaj junulinoj. Li ĝentile deprenis la ĉapelon. Dum la supreniro iu el la inoj kolerete elvoĉis fi-vorton pro nehalto ĉe iu etaĝo. Kun signifa gestfaro, la sinjoro firme remetis al si la ĉapelon.

## ESPERANTO - KLUBO en CAULFIELD GRAMMAR SCHOOL

Dum 1962 (mia unua jaro en tiu lernejo) mi lunĉhore instruis Esperanton al deko da knaboj, en nur unu jaro (Subintera klaso—Subintermediate), kiuj jarmezze 1962 starigis Esperanto-Klubon, kun la lernejestro kiel patrono. Ĝia aktiveco ĝis nun ne estis ampleksa, sed ni intencas fari pli da laboro ekde nun. Jam dum jaro ni havas anonctabulon en la lernejo, ĉe aliaj, videbla de ĉiuj. Mia lernolibro estis "Esperanto Teacher" (Mason Stuttard).

Du el la lastjaraj lernintoj ĉi tiun jaron instruas Esp. al deko da knaboj de la dua kaj tria klasoj; mi mem havas klaseton (ses aŭ sep) de pli maljunaj knaboj (Lerneĵfinaj—Leaving), kiuj bone studas, kaj uzas (same kiel la aliaj klasoj nun, kvankam ili preferus M. Stuttard) A Practical Course" (Szilagy).

Antaŭ kelkaj semajnoj nia Esperanto-Klubo decidis postuli kotizon de 5 ŝilingoj por jartriono, por per tio aĉeti bibliotek-librojn. Du el lastjaraj lernantoj vizitis la M.E.S. foje.

Niaj membroj ŝatus havi kontakton (kaj fojajn kunvenojn) kun Esperanto-kluboj (aŭ individuaj junaj Esperantistoj) en aliaj lernejoj en Melbourne.—M. Leereveld.

## THE OLDEST LIVING

Esperantist is Anak. Stamatiadis, a Greek, born in 1868 and an Esperantist since 1892.

## Australia Kroniko

**MANLY:** Nia societo lastatempe organizis kelkajn ekspoziciojn. 12-taga ekspozicio okazis ĉe la Urba Biblioteko, 14-taga ĉe la Urbdoma Montra Fenestro kaj 1-taga en la Urbdoma Salonego, en la kadro de la aŭstralia kampanjo "Forigu la Malsaton". Ĉiusemajne aperas E-novajoj en rubriko "Esperanto-Angulo" en la "Manly Daily". 5000 presitaj flugfolioj estis disdonitaj.

Dank' al tiu propagandlaboro aliĝis 55 personoj al 3 kursoj ĉe la Vespera Kolegio. Instruas s-ro P. Schwerin, s-ro K. Smith kaj s-ino M. Duncan. Al neoficiala taga kurso aliĝis 8 personoj, kiujn instruas s-ino B. Cleminson.—M. Duncan.

**HORNSBY, N.S.W.:** La plimulto de niaj membroj estas lernantoj, kaj por instigi ilin paroli nia instruisto, s-ro F. Mueller-Sorau, iniciatis la ideon ke ĉiu membro parolu pri temo indikita sur paperslipo tiritita el ĉapelo. Tiu ideo estis sukcesplena kaj jam okazis kelkaj tiaj vesperoj.

Specialan adiaŭan vesperon ni aranĝis por nia prezidanto, s-ro K. Bowling, kiu vizitos Usonon. La plimulto de niaj membroj venigis siajn amikojn kun la celo interesigi ilin pri nia movado. S-ro J. Matasin, la S.E.S. Prezidanto, montris lumbildojn pri sia vojaĝo tra Eŭropo kaj renkontiĝoj kun eŭropaj Esperantistoj. — V. J. Timmins.

**CANBERRA:** Kanbera E-Klubo estis feliĉa bonvenigi la eminentan Prof. Bjorn Collinder el Uppsala Universitato, Svedujo. Prof. Collinder, kiu estas emerit-profesoro de Finn-Ugraj lingvoj ĉe Uppsala, estis en Kanbero pro dumonata aranĝo kun la Nacia Aŭstralia Universitato, kiel "Vizitanta Profesoro". La Esperantistoj de Kanbero havis la plezuron konatiĝi kun la profesoro je 2 okazoj.

Ĉe la hejmo de S-ro Ralph Harry, 10/7, li renkontis nian plej novan grupon, konsistanta el 12 komencantoj. Post la fino de la leciono, S-ro Harry veturigis lin al la hejmo de S-ro N. Gamble, kie li renkontis anojn de la meza kaj studronda grupoj. La dua okazo estis kunveno 24/7 en la Haydon-Allen Konstruaĵo de la Aŭstralia Nacia Universitato, kiam la profesoro alparolis grupon de

proksimume 30 personoj, plejparte Esperantistoj.

Prof. Collinder, post mallonga Esperanto-parolado, prezentis tre interesan eksperimenton por montri la taŭgecon de Esperanto por sciencaj aferoj. Li antaŭe tradukis elĉerpajojn el 3 teknikaj libroj, en Esperanto. S-ro Harry, kun tute nenia antaŭa scio pri la afero, tradukis ilin ree en la anglan kaj tiuj ĉi tradukaĵoj estis komparataj kun la originalaj tekstoj. Oni trovis, ke spite de malfacilaj teknikaj esprimoj uzataj, estis preskaŭ nenia variaĵo inter la tradukaĵoj de S-ro Harry kaj la originaloj.

Poste, Prof. Collinder aparolis angle pri la grava problemo de interkomprenado inter la sciencistoj kaj pri Esperanto kiel solvo.

Sekvis prezentado de la nova kolorfilmo "Jen Aŭstralio" kaj por fini la kunvenon okazis 2 prezentadoj: S-ino J. Torr faris prezentadon al la profesoro de 2 libroj: "Nepalo Malfermas la Pordon" (de T. Sekelj) kaj "Kanakano el Kananam" (de K. Linton). Craig Thompson, 15 jara komencanto, kiu studis Esperanton dum nur 8 semajnoj, subtenis la paroladeton de S-ino Torr kaj prezentis al S-ino Collinder keramikan cindrujon en formo de bumerango.

—Harry Torr.

**HOBART:** Amikoj de S-ino Alice Douglas malĝojos scii, ke ŝi nuntempe ne povas partopreni en Esperantaj aferoj pro grava malsano. Ni esperas ke ŝi baldaŭ resaniĝu kaj revenu al ni.

La aŭgusta kunveno de nia grupo estis speciala kunveno, ĉar ni kunvenis kune kun la anoj de la Esperanto-Klubo de la "Friends' School" kaj aliaj gelernantoj kiuj lernas Esperanton. La programo konsistis el malgranda teatraĵo, verkita de la instruisto kaj kantoj, ludoj kaj manĝeto. Ĉiuj ĝuis la okazon.

Ni esperas ke ni baldaŭ povos akiri la filmon "Jen Aŭstralio" por montri en la lernejo kaj ĉe la kunveno de la Hobarto E-Grupo.

—G. Lancaster.

**ROCKHAMPTON:** Ekspozicioj de Esperanto-libroj, gazetoj kaj leteroj ricevitaj el eksterlando okazis en la elmontraj fenestroj de "Queensland Book Depot", en 2 aliaj libro-vendejoj kaj en la "Rockhampton Show". La

loka taggazeto "Morning Bulletin" regule raportas pri la agado de nia societo.

**PERTH:** Nia vicprezidanto S-ro C. Dean parolis, 11/7, pri vojaĝo al Melburno. Li montris kolorajn lum-bildojn kaj ankaŭ raportis pri vizito al la Melburna E-Domo, kie li renkontis multajn s-anojn. Samvespere f-ino Woolley rakontis pri vojaĝo per ŝipo al Singaporo.

En la kunveno de 25/7 S-ino G. Pollard priskribis sian ferion en la sudokcidenta parto de la Stato.

Dek du ges-anoj partoprenis dimanĉe 24/7 piknikon en Armadale, kie ni renkontis la familion Harris el Jarrahdale. La aranĝo estis sufiĉe sukcesa kaj ĉe teo kaj kukoj ni multe praktikis Esperanton.

Tridek ges-anoj sekvis inviton de Ges-roj C. Dean kaj partoprenis 11/8, sukcesan muzikan vesperon en Kalamunda. F-ino O. Stempel, jus reveninta el Eŭropo, plezurigis nin per kantoj, kaj per diversaj diskoj ni faris spirite vojaĝon tra multaj landoj. Dankojn meritas S-ino Dean kaj Brown pro la bongustaj frandaĵoj per kiuj ili regalis nin.

Plenplena estis nia Ligĉambro 22/8, kiam S-ro W. Illingworth montris belajn diapozitivojn kaj priskribis detale vojaĝon tra Nov-Zelando.

**MELBOURNE:** La ĉi-jaran "Amerikan Teon" (24/6) ĉeestis 45 personoj, kiuj vigle marĉandis por aĉeti donacitajn bakajojn, plantojn, brodaĵojn, librojn ktp. Kvar loterioj aldonis al la bruo kiel ankaŭ al la enspezoj, kaj finfine la soifaj marĉandintoj pligrandigis la enspezojn per aĉeto de refreŝiga manĝeto. Rezulto estis nova rekordo: £34-5-10.

Prelegon pri poezio faris S-ro Banham (1/7). Li forte substrekis la valoron de poezia tradukado kiel ekzercon. Li ankaŭ resumis la kontribuon de Zamenhof kiel poeto. Nia juna membro Daniel Kane, kiu mem instruis al si Esperanton kaj ankoraŭ ne estas 16-jara, faris—22/7—interesan prelegon pri la diversaj projektoj por solvi la bezonon por mondhelpingvo.

Informplanan prelegon kun kolor-bildoj pri Lord Howe Insulo faris S-ro F. Gewecke (29/7). Ni lernis multon pri la historio kaj geografio de tiu feriparadizo. S-ro M. Leereveld, feliĉulo kiu faris 3 feri-vojaĝojn

dum la pasintaj monatoj, montris (19/8) diapozitivojn pri siaj veturoj al Perth, Tasmanio kaj Sidnejo. S-ro Mitchell montris kolorbildojn kaj donis informplanan prelegon pri la Ruĝa Koro de Aŭstralio (26/8).

En la junia kunveno de la REN-DEVUO S-ro P. Holmes el Seymour rakontis gajanime pri sia vojaĝo al Eŭropo. Li montris kolorbildojn pri diversaj samideanoj en Grekujo, Italujo kaj Anglujo kaj samtempe aŭdigis magnetofone iliajn voĉojn. Rememoroj pri la Melburno de lia junaĝo estis la temo de S-ro E. McKenzie en Julio. En Aŭgusto ni havis la plezuron aŭskulti al Pastro C. Cowling, kiu nun loĝas en Melburno. En sia prelego "Homoj el Rubejoj" li priskribis kiel la restaĵoj elfositaj de arkeologoj malkovras faktojn pri la homa vivo en la antikva tempo.

### FONDAĜO DOMO U.E.A.

S-ino Matasin, la alte estimata edzino de la tre populara prezidanto de Sydney Esperanto Society, aranĝis en sia domo specialan vesperon por vendado de plastikaj vazoj (Tupper Ware). La profito de tiu vespero atingis la sumon de £10, kiun ŝi donacis al la Fondajo Domo de U.E.A. Por ŝia bonega klopodo kaj la tutkora subteno de niaj Sidnejoj samideanoj, mi deziras nome de la U.E.A. esprimi nian profundan dankon.—K. G. Linton, ĉefdelegito de U.E.A.

### GENERALA KUNVENO DE A.E.A.

La Generala Kunveno de A.E.A. okazos en la Konferenca Halo de la "Council of Adult Education", 19 Russell Street, Melbourne, je Jaudo, 2-an de Jan., 1964.

#### Tagordo:

- (1) Jarraportoj de la Asocio
- (2) Proponoj de la membroj
- (3) Elektro de Estraro
- (4) Estonta agado de la Asocio
- (5) Loko de la 1966-a Kongreso
- (6) Eventualajoj.

Klubo kaj individuaj membroj sendu proponojn por la Generala Kunveno antaŭ la 15-a de Dec., 1963, al: A.E.A.—Box 2122 T., Elizabeth Street P.O., Melbourne.—Herbert Koppel, Hon. Landa Sekretario.

### U.E.A. YEARBOOK

The first part for 1963 has 511 pages; the second part is issued later in the year and has some 150-200 pages. Essential for the active Esperantist, it gives addresses of 3197 "consuls" in 64 countries, including the U.S.S.R., lists of 100 Esperanto gazettes and 44 publishing companies, radio stations transmitting Esperanto, the personnel of the Language Committee, notes on the many cultural activities in which Esperanto is engaged, a 36-page inventory of books, &c., obtainable through the U.E.A., and much else of interest and help.

Membership rose from 30,356 to 32,209 in 1961-2. To receive the Yearbook with membership, 19/- . With the gazette "Esperanto" (monthly), 38/- . Supporting members, 57/- . —Ken. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, Victoria.

#### A.E.A. YOUTH SECTION

Young people up to 25 interested in forming a Youth Section of the Australian Esperanto Association please contact Mr. Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne, Vic.

#### SENSEMA? SEN-SEMA?

El reklamo en "Esperanto" (7/63): "...specimenoj el ŝia sensema poemaro". Leginte la poemaron do, supozinde oni vane atendas ĝermadon de fruktiga penso, pro manko de ide-semoj en ĝi. Ni preferas, ke ŝia poemaro estu "sentoriĉa". (La miskomprenon kaŭzis uzo de la neologisma radikulo sens').

#### PRI ANGLA ROMANO

Dum unu jaro, en la tuta Usono, oni vendis nur 37 ekzemplerojn de "The Master of Ballantrae" (R. L. Stevenson) en malkara broŝurita poŝeldono.—("No! In Thunder", p. 102: L. Fielder).

Esperantaj eldonistoj, kuraĝigu!

#### SEE OUR NUMBER 89.

We remind our readers that the Special Centenary Number of this paper should have been numbered 88. This reminder is given because of some confusion among those who preserve or bind the consecutive copies.

## Recenzoj

**Fabeloj:** H. C. Andersen: 4a volumo. Tradukis L. L. Zamenhof. Samformata kiel la antaŭaj volumoj. 53 bildoj; 242 paĝoj. 41.70 steloj (£1/8/-) plus 10% sendkosto. Eldonis Heroldo de Esperanto.

La rakontoj de Andersen unue aperis en 1835; la lastaj el ili en 1872, do en tempo, kiam Zamenhof portis la pezon de 11 jaroj de l'aĝo. Ĉu ankaŭ li salutis kun plezuro tiun eldonon? Certes, kiel matura viro, li sentis fortan allogon al la verko.

Oni povas demandi al si: kial nome Zamenhof tiel multe tradukis el la Fabeloj—ne rekte laŭ la originalo, sed laŭ Germana traduko—anstataŭ traduki verkojn el lingvoj bone konataj de li? Ekzemple: la "paraboloj" verkitaj de Tolstoj por Rusaj kamparanoj; la ferakontoj de Perrault, Hauff kaj Grimm; similaj el la Pola kaj Jida. Povas esti, ke io alia ol la nure lingva lin inklinigis al lia fakta faro. Supozinde li sentis animan parencecon kun la Dana aŭtoro, kies fabeloj elspiras pian fidon, bravan humanecon, puran moralon, amon al la simplaj homoj kaj ties hejmeccaj virtoj, kaj simbolan instruadon pri la vivo kaj morto.

La du longaj—Filino de la Marĉa Reĝo, kaj Historio de la Dunoj—okupas ĉ. trionon de la tuta volumo. La aparta fantazieco de la unua postulas paciencan simpatiecon de legantoj.

La fabelo Kion la Patro Faras... prezentas en si, pro verŝajna koincido, pligrandigon de la rakonta kadro de Johano Feliĉulo (Grimm). Tiu ĉi rakontas pri stultulo, kiu vice interŝanĝas orpecon kontraŭ ĉevalo, kaj de tiam daŭre interŝanĝas kontraŭ objektoj de malpliiganta valoro ĝis fine li sin trovas posedanto de senutilaj ŝtonoj, kiujn li akcidente perdas. En la Andersena, bubo, havante ĉevalon, simile interŝanĝadas ĝin kaj sekvantaj akiraĵojn ĝis li havas nur kelke da putraj pomoj. Tiam venas surprizo: pro siaj faroj li ricevas benojn, dankojn, de la egale stultaj gepatroj.

Lingve la libro estas mino de trezoro. Ofte okazas la esprimo "kvazaŭ... -us" (aŭ indikativo), kvazaŭ dirajmo de la aŭtoro. Oni trovas

en ĉi libro ne malpli ol 26 kun -us kaj 26 kun indikativo. Malfacile estas, fari klaran distingon.

Propraj nomoj: Druido, Normandoj (A. Northmen), Neapolo, Venero, Pompejo, Herkulano, Luter, Mesiado (Mesio?). Por virinaj nomoj: Ido, Doroteo, Anneto, Johanino k.s. Plej-ofte propraj nomoj kaj derivaĵojn havas majusklon, sed iufoje "dana, italo, hispano". Eĉ adverbe troviĝas "Kristane (baptita)".

Neplaĉe al la Plena Gramatiko oni vidas: tien kaj reen, pluen. 20: "efikas sur la ovojn" (manko de akuzativo); 99: "tie aŭ alie" (ankaŭ: vol. 2, 152). Vidu: Lingva Kritiko, n-ro 25. 106: dekdu (kial nun vorto?); 22: ... tion sciigi.

**Proverbaro Esperanta:** L. L. Zamenhof. Aranĝita de C. Rogister. 26 plus 168 p. Us. dol. 1½. Eldonis Stafeto.

Estas plezure, vidi novajn eldonojn de la klasikaj verkoj. En 1954 aperis redaktita represo de la Fundamenta Krestomatio; sur alia paĝo ni vidas recenzon de la Kvara Volumo de la Fabeloj de Andersen. Kaj jen La Proverbaro, pacience aranĝita cele al pli facila uzado. Pro la morto de la iniciatinto, ties taskon finplenumis A. Caubel. G. Waringhien verkis antaŭ-kaj postparolon, kaj troviĝas antaŭ-paroloj de Marko kaj Ludoviko Zamenhof de el la frua tempo.

La Proverbaro aperis en La Revuo kaj poste en eldono de Hachette (1910) kun utila indekso, kelkopinie ne malpli helpa ol la nova aranĝo. La noto en la E. Enciklopedio (1933-34) estas iom enigma. "Dua eldono 1905". Ĝi ne mencias posteajn eldonojn. Kiel ajn estu, ĉi eldono de Stafeto aperis 53 jarojn post la Hachette'a de 1910, kaj la verko supozinde elvendiĝis antaŭ pli ol 30 jaroj.

La citserĉa sistemo en la nuna eldono alfabeto listigas la proverbojn; poste sekvas analiza kaj sinteza aranĝoj. Estas timinde, ke multaj trovos la "analizan" neoportuna, kiam ekzemple ili serĉas taŭgan proverbon por ilustrati, ke "konstanta praktiko portas perfektion"; aŭ ke "homo malsaĝe, pro spito, malutilas al sia propra intereso". Respondoj estas: "Kiu ripetas abunde, lernas plej funde" (1153 eld. 1910) kaj "Ne kotas besto

en sia nesto" (318); "En puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos" (1152). Ili troviĝis ne per la donita sistemo.

**Emile Peltier, Apostolo de Katolika Esperantismo:** 1870-1909. Verkita de N. G. Hoen. Eldonis I.K.U.E. 45 p. 4s.

La aŭtoro prezentas bonan bildon de tiu tempo, reliefigante la intensan laboron de tiu brava pioniro de Esp-a agado por la Katolikismo. Tre simpatie li skizas la personecon de la firmkarakterata sed malfirmkorpa apostolo, kies lukton kronis la beno de Papo Pio X. Tiu tre signifa gajno estis nomita de Peltier — iom kurioze por Azianoj — "la sankta bapto" de la Internacia lingvo.

Sur p. 7 estas eraro pri fakto. Laŭ E. Privat en "Esperanto" (Jan. 1928) Dreves Uitterdijk fondis "Holanda Pioniro" en 1903, ne Bulthuis.

Katolikoj praktike honorus la memoron de Peltier, kaj progresigus lian verkon, aliĝante al I.K.U.E. kaj abonante ties gazeton.

**Sintrompoj:** J. B. Hirscher, trad. W. Flammer. Sama eldono. 46 p. 4s.

Verkis gin antaŭ cent jaroj Germana sacerdote (1788-1865), sed la milda tamen efika satiro ankoraŭ validas por riproĉi la pli-malpli hipokritan memon de ni modernuloj. Post analizo de la antikva Farisea menso, kaj la korektiga sinteno de Jesuo kontraŭ ĝi, li donas 62 paragrafojn, kiuj ilustras la sintrompan Fariseecon de modernaj religiuloj kaj konvencij bonkondutuloj. Per ili oni povas esplori la subkonsciajn motivojn, kiujn la nurŝajna edifo de sintenoj kaj paroloj kaŝe vualas.

Ekzemple, en ĝardeno vi erudicie parolas pri la floroj, pompe nomante ilin klasike; en galerio kaj biblioteko vi demandas pri artaĵoj kaj libroj. Sed ne la naturo, scienco aŭ arto vin vere interesas. Vi glorieme deziras montri vin klera homo, sekrete sciante, ke en nelonga tempo vi eluzos tutan vian scion.

Vi plendas pri maldankemo de la gefiloj. "Ofte mi malvarmis, maldormis, dum vi dolĉe ripozis" k.t.p. Eĉ ne vorton pri via kompatinda servistinetto, kiu laboris dum vi mem dormis kaj por vi preparis komforton.

Vi "malestimas" la mondon kaj ĝian aplaudon, sed nur ĉar ĝi ne vin sufiĉe honoras. Fakte, vi malestimas ĝian malestimon al vi.

Unu el viaj hejmanoj pekis. Vi koleras. Tamen ne estas la peko, sed la familia malhonoro, kiu vin kolorigas. Saman pekon, faritan de alia homo, vi priridas, kun sekreta plezuro.

Vi pentras belan, sekse ekscitan virinbildon. Por kaŝi vian volupton, vi scias senkulpigan vojon, titolante ĝin — la pentofara Magdalena.

Ambaŭ verketojn ni rekomendas ne nur al religiuloj, sed ankaŭ al ĉiu homo de larĝa spirito.

**ZAMENHOF, AUTORO DE ESPERANTO.**—De Marjorie Boulton; Eldonis J. Regulo, "Stafeto", Kanariaj Insuloj. 294 paĝoj, ink. 26 bildoj. Prezo 39/9 ĉe agento.

Gravega verko. Antaŭe la aŭtorino verkis biografion de Zamenhof en la Angla lingvo. Ĉi Esperanta ne estas traduko, sed estas speciale farita originalaĵo por E-istoj. Ĝi prezentas ne nur kortuŝan vivbildon, sed ankaŭ detalojn pri Zamenhof ĝis nun malmulte aŭ tute ne konatajn de ni.

**KIEL AKVO DE L'RIVERO.**—Originalo de Raymond Schwartz. Sama eldonejo. 488 paĝoj. Prezo 39/9 ĉe agento.

La unua multampleksa romano originala en Esperanto de post la du verkoj de Vallienne en 1907-08. Verkita de vera majstro, ĝi estas facile legebla moderna romano, kiu markas etapon en nia literaturo. Recenzoj aperos.

#### SIMILE ONI PENSAS...

Recenzoj pri "Sipestro Rakontas": "La leganto sentas sin kvazau infano, kiu... sidas apud kameno kaj atente auskultas al sia avo, kiu fabelas sen iu ajn beletra pretendo pri longaj vojaĝoj."—C. Minnaja, "Esperanto" 6/63.

"Oni kvazau sidas kun li ĉe kamenfajro kaj absorbas liajn rememorojn."—"The A.E." 8/63.

Pri "Logiko" (Martinus): "La grandaj filozofoj plej spiritparencaj al Martinus estas Bergson kaj Teilhard de Chardin. Malgrau la abundaj Biblicitaĵoj (de Martinus), lia mondkoncepto estas esence pli simila al la

Hinduismo, ankaŭ al antropozofio, ol al la ortodoksa Kristanismo".—D-ro W. A. Verloren van Themaat, "Esperanto" 6/63.

"Verŝajne la plej impona libro pri 'antropozofio'—au simila—. La sinteno de la aŭtoro estas kelkrilate parenceca kun la instruo de Svedenborg."—"The A.E." 8/63.

#### RESPONSI k.a.

Ne uzu "responsi" en senco de la A. "to be responsible for"; uzu "respondeci", formita regule laŭ la E-a vortfarado. Simile pri la nenecesaj "apreco" aŭ "aprezo", anstataŭ la klaraj "pritakso", "valortakso". "Proceso" kaj "procedo" plene taugas por la du signifoj, kaj "procezo" do estas nepre neuzinda. Senpense enkondukita balasto malfaciligas la lingvon kaj estigas dangeron de dialektigo.—Lau "Bulgara E-isto".

#### TEACHERS!

"Edukado Internacia", nr. 65 (May), organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. O. Svantesson, Skonertgatan 1, Goteborg Vr., Sweden. It gives a fairly detailed outlook on Esperanto in the field of education. The need for Esperanto teachers is stressed, and all such are urged to contact the local rep., Mrs. G. Pollard, 45 Second Av., Riverton, W.A.

#### MR. H. W. CRAIGIE

After 50 years with the Commonwealth Public Service, Mr. Craigie has resigned. He was a foundation member of the Rockhampton Esperanto Society in 1961 and has done much to further its progress.

#### SONBENDOJ

Ĉiu sam-o havanta magnetfonon! Bonvolu min kontakti por interŝanĝi ricevitaĵajn sonbendojn prunte kaj varbi membrojn.—Allan Turner, 774 P.O., Shepparton, Vic.

#### PROSPEKTOJ

Turismaj folioj pri Nancy, nordorienta Francujo. 9 rue des Dominicains. Kaj Barcelono, str. Montcada 12.

Vizitontoj al Eŭropo, nepre kontakti kun la informoficejoj, petante Esperantajn foliojn.



# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

N-ro 37 (117)

MELBURNO

Nov - Dec., 1963

---

## Kongresa Regularo de la Australia Esperanto-Asocio

### I. GENERALAJ PRINCIPOJ

1. Almenaŭ unufoje en ĉiu 2 jaroj okazas Aŭstralia Esperanto-Kongreso. La kongreso devas esti invitita de la loko Esperantistaro pere de ĝia (j) organizajo (j).
2. Aŭstralian Esperanto-Kongreson prezidas Prezidantaro konsistanta el:
  - (a) La Prezidanto de A.E.A.,
  - (b) la Vic-Prezidantoj de A.E.A., aŭ A.E.A. Estrarano nomita tiucele de la Prezidanto,
  - (c) La Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato.

### II. ORGANIZADO

3. La kongreson organizas Loka Kongresa Komitato (L.K.K.), kiun elektas ĝenerala kunveno de la loka Esperantistaro, kiu invitas la Kongreson. La elekto bezonas la aprobon de la Estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.
4. Laŭeble la Loka Kongresa Komitato konsistu el:
  - (a) Prezidanto
  - (b) Sekretario
  - (c) Kasisto
  - (ĉ) Komisiito por koncerto kaj amuzaj aranĝoj
  - (d) Komisiito por transporto kaj ekskursoj.

### III. FINANCOJ

5. La Estraro de A.E.A. interkonsente kun la L.K.K. decidas pri la Kongresa Kotizo. Individuaj membroj de A.E.A. rajtas ricevi rabaton.

6. La L.K.K. pagas al A.E.A. 20% de ĉiuj kotizoj.
7. El eventuala monprofito 50% iras al la loka Esperanto-organizaĵo (j) kaj 50% al A.E.A.  
(Akceptita de la Generala Kunveno en Sidnejo, Januaro 1962.)

#### 14th AUSTRALIAN ESPERANTO-CONGRESS

This Congress will take place from 30 Dec., 1963, to 5 Jan., 1964, at the Conference Hall, Adult Education Centre, 19 Russell Street, Melbourne. It will be officially opened by Dr. Jim Cairns, M.H.R. for Yarra, on 31 Dec., 1963, at 10 a.m.

##### Third List of Congress Members:

107. Mr. K. Smith (Bonville, N.S.W.)
108. Mr. S. H. Grant (Port Lincoln)
109. Mr. R. L. Harry (Canberra)
110. Dr. Ross Robbins (Canberra)
111. Mrs. O. Glenie (Melbourne)
112. Mr. E. Hanks (Melbourne)
113. Mrs. P. Hanks (Melbourne)
114. Miss W. Addis (Adelaide)
115. S-ino F. Vawser (Adelaide)
116. Miss M. Reed (Adelaide)
117. Mr. J. Kew (Melbourne)
118. Miss C. M. Morris (Adelaide)
119. Mr. J. Dimo (Ballarat)
120. Miss J. Clack (Ballarat)
121. Miss D. R. James (Adelaide)
122. Mr. A. Turner (Shepparton)
123. Mr. J. R. Thomas (Oakleigh)
124. Mrs. Z. Goff (Camberwell)
125. Mr. S. J. Kelly (Melbourne)

State Distribution: Victoria 85, N.S.W. 21, South Australia 10, Tasmania 3, West Australia 3, A.C.T. 2, Queensland 1.

The date on our Number 35 (115) should be "Julio-Aug."! Please make this correction on your copy.

La datindiko sur nia N-ro 35 devus esti "Julio-Aug." Bv. faru korekton.

#### PRI DEBATO

En debato neniu kapablas venki kontraŭulon, se li ne povas prezenti ties argumenton pli forte-impresive ol la kontraŭulo mem povas tion fari per si mem. Li devas povi pritrakti ne nur tion, kion la kontraŭulo diras, sed ankaŭ tion, kion tiu **povus** diri, sed tiu eventuale pensus pri ĝi.

Tiu konsilo aŭ averto aplikiĝas ankaŭ al recenzantoj de verkoj kies temoj estas iasence diskutablaj.

## Australia Kroniko

**BRISBANE:** En la kunveno in-  
struado daŭras. S-ino Beck, kaj S-roj  
Gunster kaj Grant gvidas 3 klasojn.  
Ĉi-jare la Zamenhofa Festo havos  
lokon en la nova kampara hejmo de  
Ges-roj G. A. Grant.

S-ro J. Moore, ano de la Klubo en  
Rockhampton, antaŭ kelke da semaj-  
noj vizitis la UEA-Delegiton en lia  
oficejo en Brisbano. Li entuziasme  
rakontis pri la granda sukceso de la  
tiea klubo gvidata de S-ro H. V.  
Petley.

**MELBOURNE:** Varia programo  
distris kaj edukis la membraron dum  
pasintaj semajnoj. S-ro K. Linton  
legis (2/9) diversajn literaturajojn;  
S-ro E. McKenzie parolis (9/9) pri  
"La tanado de ledoro"; nia plej juna  
membro Daniel Kane informis nin  
(16/9) pri la "E-Junulara Organizo"  
kaj nia angla amiko J. Thompson  
(23/10) admonis nin "Kiel pasigi la  
libertempon".

S-ro J. Ryding, kiu aeroplano re-  
venis de la Univ. Kongreso en Sofio,  
montris (30/9) lumbildojn pri Bul-  
gario kaj la kongreso. D-ro A. Fri-  
denbergs, kiu ĵus revenis de Darwin,  
priskribis (7/10) siajn aŭtobusajn  
aventurojn. S-ro Herbert Koppel  
donis (14/10) detalan raporton pri la  
Sofia kongreso, parte laŭ aerpoŝte  
ricevitaj raportoj, parte laŭ personaj  
impresoj de f-ino Amy Godfrey, kiu  
cetere reprezentis A.E.A. ĉe la Univ.  
Kongreso. Itala s-ano Mario Mase  
prelegis pri "Montgrimpado" kun  
lumbildoj (21/10) kaj S-ro J. Ryding  
faris duan lumbildparoladon (28/10)  
pri sia lasta vojaĝo tra Eŭropo.

S-ro F. R. Banham faris (4/11)  
duflankan prelegon: Disertacio "Pri  
la nostalgio de enmigrinto" inkluzivis  
rememoran pensvagadon tra infanaĝaj  
spertoj kaj klarbildajn komparojn pri  
Kristnasko en du hemisferoj. "La  
lastaj tagoj de Zamenhof" estis la  
temo de la dua parto.

En la septembra kunveno de la RENDEVUO, S-ino P. Hanks prelegis pri "Miraklo en la Moderna Mondo", en kiu ŝi priskribis la miraklan evoluadon de la nov-kreita ŝtato "Israelo". Sia interesa prelego bazigis sur korespondado kun multjara plumamiko O. Ginz kaj sur faktoj elĉerpitaj el oficialaj publikajoj de la nova ŝtato. En Oktobro F-ino Elsie Godfrey rakontis historion pri skandala turniro inter la "nobeluloj" de la Viktoria epoko.

**PERTH:** Preskaŭ 30 s-anoj venis por saluti S-inon Shankley kaj filinon Erika el Hobarto (29/8). La vizitantoj distris nin per interesaj bildoj de multaj lokoj en bela Tasmanio. S-ino O. Malcolm (26/9) montris diapozitivajn pri feri-vojaĝo al Carnavon, kie ŝi fotografis sovaĝflorojn kaj krutajn marbordojn. Samvespere f-ino D. Leach lumbilde kondukis nin tra Bangkok, Singapore, Hongkong kaj Japanujo. F-ino O. Strempe (10/10) montris diapozitivajn pri sia vojaĝo tra Eŭropo kaj pri la internacia Baha'i kongreso kiun ŝi partoprenis. Ŝi faros alian prelegon en la nova jaro.

**MANLY:** Dum tri tagoj (31/8-2/9) la Klubo ĝuis viziton de D-ro Ross Robbins, prez. de la AEA. Kun li ni plezure ekskursis, festis en hejmoj de anoj kaj en la centro, Esperanto Domo, bedaŭre lin adiaŭis.

Ĉiumonataj kunvenoj je la 3a dimanĉo: Aŭguston S-ino K. Schwerin parolis pri Pariza Kongreso kaj Septembron ni piknikis ĉe Bobbin Head.

Ĉiun jaŭdon ni kunvenas ja la sepa en ĉambro disponigita de S-ro Furzer, la estro de Manly Vespera Kolegio. S-ro Forbes, red. de "Manly Daily" invitis nin kunveni en la oficeja kantino dum kolegiaj libertempoj. Kursoj je tri gradoj daŭras ĉe la Kolegio. "Manly Parolas", nia tut-Espa kluborgano, presita, 4 paĝoj. N-ro 4 pri-traktas la Operdomon kaj enhavas alilandajn rakontojn. Sendu 6s. por 4 sinsekvaj n-roj al S-ino Cooley, 27 Waratah St., Harbord, NSW. Esp-istoj el ĉie, skribu: S-ino M. Duncan, 119 Bower St., Manly.

**ESPERANTO-KLUBO de ORIENTAJ ANTAŬURBOJ:** 2/8: Monata kunveno ĉe hejmo de Ges-roj Shaw en E. Burwood. Alestis 30 membroj; komunaj kantoj kaj diapozitivaj pri Hispanujo kaj Svislando.

15/8: Binnie Lamb (XY radistacio) intervjuis du membrojn dum 20 minutoj.

15/9: Piknikis ni en Montaro Dandenong kaj ĝin filmis en koloro, kiel parton de filmo prezentota antaŭ la Kongresanaro. En Septembro ni "vojaĝis" tra Hindujo per diapozitivaj de Ges-roj Emms. S-ino Smith parolis pri la historio de Viktorio.

Nia klubo kongresprograme preparas viziton de kongresanoj al la nova komerca centro en Chadstone; akceptos ilin la Konstanta Komitato de Chadstone kaj profesia gvidanto kondukos tra la centro. Ni prezentos humoran skeĉon "Manaken-parado" vespere en la ĝardeno de Ges-roj Ryding en Sandringham (31/9). La klasikan parton de la koncerto organizas membro S-ino Sanders.

14 membroj jam aliĝis al la Kongreso; ni esperas pri plio.

Novembro: Ĉe la hejmo de S-ino Sanders ni diskutis nian agadon por la Kongreso, kantis, muzikis kaj ĝuis frandaĵojn de nia gastigantino. 6/12: Subĉiela festeneto en la ĝardeno de S-ino Fink kaj prezento de filmo pri nia klubagado de post ĝia fondo en 1962. Ĉiusemajne aperas artikoloj pri E-o en antaŭurbaj semajngazetoj.

Jam en 1964 nia klubo havos konstantan ejon, en Waverley-ŝtalternejo (legejo)—moderne meblita kaj tapiŝita. Ni nun nombras 40 membrojn kaj espereble plianigos, dank'al nia nova ejo. Klopode de nia komitato, en la programero "Professor Brown Study" (televideo 9) E-isto estos intervjuata en la Kongresa tempo.—Irene Fink.

### SONBEND - AMIKOJ!

Mi deziras scii, kiom da Esperantistoj en Aŭstralio korespondas alilanden per magnetofono, kaj mi ankaŭ proponas interpretadon de senbendoj ricevitaj el aliaj landoj. Eble ni povos starigi grupon sub ĝusta kontrolo.—Allan Turner, Poŝtkesto 774, Shepparton, Victoria, Aŭstralio.

### PRI "HAMLETO"

S-ro Ribot (Marmande, Francujo) deziras eldoni la Zamenhof-tradukon de "Hamleto" kun klarigoj de S-ro Gregor (Londono). J. Regulo (Stafeto) eldonos ĝin en nova verstraduko el la Angla fare de L.N.M. Newell.

## Recenzoj

**Kiel Akvo De L' Rivero:** Raymond Schwartz. Eldonis J. Regulo, Stafeto: Kanariaj Insuloj. 488 paĝoj. Broŝ. 3 dol. bindita 3.80 dol.

En kritika antaŭparolo al Rusa eldono de rakontoj, Tolstoj akuzis la aŭtoron, De Maupassant, ke li prezentas Francajn kamparanojn per malestimo, malŝato, kvazaŭ ili estus nur brutoj, krudaj, voluptaj kaj malnoble avaraj.

La granda Ruso sekve asertis, ke la bildo estas nekompleta kaj donas falsan impreson.

Ne tiel rigardas tiujn Francojn nia Raymond Schwartz en ĉi grandioza romano. Homo de du kulturoj, li ame sane observas bonajn kvalitojn ne nur en la Francaj "mezhomoj", sed ankaŭ en Germanaj. Ĉiun plumstrekon li faris laŭ larĝmensa humaneco kaj indulga komprenemo.

Facile legebla kaj forte atentotira, la verko estas inspire edifa tributo al la homa naturo, precipe al la sindona lojaleco de homo al homo sub ofte teruraj kondiĉoj. Mankas al ĝi tiu cinikismo ŝajne nedisigebla en la menso de modernaj "realismaj" romanistoj.

La riĉa detala pribildado de naciaj moroj, individuaj karakteroj, scenoj urbaj kaj pejzaĝaj — kaj la humanecaciaj analizoj pri la politiko kaj homa motivado — estas valora kronikmaterialo por observantoj de epoko ankoraŭ en memoro de sesdekjaruloj.

Certasence la verko pensigas pri "Jean Christophe" de Romain Rolland, ĉar ĝi priskribas la korpan kaj animan disvolviĝon de unu viro, implikita en rilatoj de du nacioj. En ambaŭ verkoj formiĝas similaj situacioj, krom nur ke mankas al la Ŝvarca libro la densa filozofia meditaĵo de la Rolanda kaj ties funda esprimo de profunda penso. Sekve do la nuna verko estas, ĝis modesta grado, populara prezento de vivkroniko simila al la granda klasikajo.

Fojn post fojo, situacioj retiĝas, por montri, kiel funde moralaj sentoj venkis la tenton, sekvi facilan vojon al abismo de l'honto, kaj levi aŭ reteni la homan spiriton sur nivelo de memrespekto.

Mallonge resumite, ĉi mamuta verko komenciĝas per anuza priskribo de kamparana geedziĝo, en kiu sin miksas du ĝendarmoj serĉantaj friponon.

Tiel ingrediencie, la sceno estas vive, humore montrita, kiel tipa festo ĉe nordfrancaj landanoj.

Pierre Touchard, frato de la nov-edzo, poste iras en Germanujon kiel instruisto. Tie li konantiĝas kun la tieaj societaj moroj, observas la nacian etoson, enamiĝas kun fraŭlino, kaj dum la krizaj tagoj de la frua militperiodo 1914 fine eskapas al Francujo, kie li loĝas ĝis la kataklismo de 1940, kiam li servas kiel sekreta helpanto de la rezistmovado. Hazarde renkontinte en Marsejlo sian Germanan amatinon, vidvinon de German oficiro kun filo 28-jara, kies patro li estas, Pierre rendevuas kun ŝi. Ilian kaŝdomon la Gestapo invadas. Pierre sukcese fuĝas en nord-Francujon, kie li sin kaŝas ĝis la armistico. La amatino restas kaptito.

Kiel la afero finiĝas, tion legantoj absorbos kun streĉa intereso. La finajn paĝojn ili fermturnos, admirante aŭtoron tiel kortuŝe tributintan al la nevenkebla spirito de lia popolo.

—F.R.B.

"Sennacieca Revuo", N-ro 91, 57 paĝoj. Eld. S.A.T., Parizo. Prezo 5 ŝ.

Ĝi konsistas plejparte el artikoloj pri soci-scienco kaj politik-filozofio — temoj, kiuj invitas al debato kaj rebato.

L. Laurat revivigas bildon pri la skolo "Aŭstro-Marksisma" — de Kautski, Renner, Adler, Hilferding, Bauer.

W. P. Roelofs klare analizas aspektojn de la teorio de ekonomo Silvio Gesell pri "la homa ekspluatado".

Pikante, sed bazoptimisme, Lagrange esploras la evoluigon de l'homa moralo, la koston kaj akiron de tiu sanga progreso alten. Flankdire asertas absurda la Biblian diron ĉe Levidoj 11: 23, ĉar "neniam ekzistis tia besto". Teologo rajtus respondi.

P. Robin malvualigas la brutecan staton de la virinoj en Sekso, Drogo kaj Religio, kaj vipas la kruelecon en landoj ironie subskribintaj la Konvencion de Homrajtoj.

D-ro D. Dimitrijevic lume komentas pri la Premioj-Nobel, reliefigante, ke mankas inter honoritoj multaj meritindaj homoj, kaj klarigante motivojn de la Sveda Akademio, kiu nomas gajnintojn. Sekvas studo pri la plejnova Premiito, Jugoslava literatoro Ivo Andrić.

Solida kaj aktuala skizo pri la Riukiu-insularo de H. Kosinoka. Sur tiu Japano tero okazis furioza batalado, interaliloke ĉe Okinaŭa.

Skeldido prezentas la penson de Jezuita herezulo Teilhard de Chardin, modife modere taksante lian idealoron.

Anonimulo ekzamenas la Popol-problemojn de Orienta Afriko.

Por variigi enhavon, P. Neergaard kontribuas pri printempa plantvivo, N.B. donas tradukon el Historio de Unu Krismo (V. Hugo) kaj R. Schwartz lerte vortludas per humoraĵo.

Traduko de "If" (Se) de Kipling, fare de G. Mattos, kaj "Prometeo" (Goethe) super nomo de Ernst Werner. Pri tiu Germana poemo ni rimarkas, ke ĝi aperis en "Eterna Bukedo" (1931) sur kies frontpaĝo staras la nomo de K. Kalocsay. La du tekstoj estas laŭlitere samaj, escepte de du prezeraroj, kaj manko de 5 versoj al tiu en la "Eterna Bukedo".

Imitinde modesta prezo por tia revuo.

**La Surtera Paco**, Enciklo de Papo Johano XXIII, tradukita en Esperanton. Eldonis I.K.U.E. Kun Latina kaj Esperanta antaŭparoloj. 61 paĝoj. Prezo 10 steloj (6/8 Australia).

Bona traduko de "Pacem in Terris". Per tiu dokumento de grave historia signifo, Papo Johano en 1963 klare prezentis la sintenon de la Romkatolika Eklezio al problemoj sociaj, individuaj, naciaj kaj internaciaj, Gi meritas studon de ĉiu sociologema.

P. 11: reveli. Ne uzita laŭ la difino en la Plena Vortaro. Tamen ĉiam pli vaste uzigas ĝi anstataŭ la korekta "revelacii". 12: Laktanco (Lactantius, Kristana apologiisto), ne estas klara sen piednoto. Simile ĉe "Sap. 6: 1/3" (?).

35: Reguli (reguligi); uzo de variantoj situ(aci)o, soci(al)a. Ĉu la Latina originalo uzis diferencajn vortojn por tiuj variantoj? 39: senigitaj de (al aŭ je). "de" post participo montras aganton. enkludas (inkludas = inkluzivas, pare kun ekskludi = ekskluzivi). 49: subsidiara (akcesora, flanko).

**Suplemento al Plena Vortaro:** 63 p. Kompletigo al la grandformataj eldonoj de 1934, 1947. 1.20 Us. dol. plus 7 p.c. (afranko) ĉe S.A.T.

## PRI LA AKUZATIVO

"Uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon—uzu ĉiam la nominativon; La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono".—Zamenhof.

"Sub influo de sia nacia lingvo, slavoj kaj germanoj emis tro vastigi uzon de akuzativo post prepozicio (ekz-e 'skribi ion sur paperon' k.t.p.)".—Noto de Waringhien.

"En la du malnovaj formoj de Esp-o, akuzativo tute ne ekzistis. La aserto . . . ke Z. lasis sin influu de siaj lingvokutimoj, estas do erara, kaj ĉar li enkondukis akuzativon nur post praktikaj eksperimentoj, li certe havis racian motivon por tio. Kaj la sola, kiun ni povas supozi, estas, ke laŭ lia sperto, la postuloj de la klareco devis sur tiu ĉi punkto superi tiujn de la simpleco."—Waringhien.

"Ĉar, el 100 manuskriptoj, almenaŭ 85 entenas troajn akuzativojn, ni emas al la Zamenhofa konsilo: En okazo de dubo pli bone uzi ĝin tro malofte ol tro ofte. En mia Vivo de Zamenhof mi skribis: 'prenante kraĵonon en la mano' kaj 'metu la nomon homo super la naciaj', eĉ 'anoncante polan lingvon kiel sia'. Studinte la frazojn, mi ankoraŭ preferus ne meti tie senutilan -n, gramatike defendeblan, kiu nur estas balasto. D-ro Corret bonvolu lasi min libera (kaj liberan)".—Privat en "Esperanto" 7/21.

Eliro 31/15 kaj Levidoj 23/3: "sed la sepan tagon estas sabato . . ." Se vere tiu frazo estas inversigebla, jene: sabato estas la sepan tagon, la akuzativo ŝajnas stranga, pro la konsilo de Plena Gramatiko par. 321: "Post **esti** oni uzas nek akuzativon, nek prepozicion: estas la deka; estis vespero". Kiel do klarigi tiun uzon de akuzativo? "sepan tagon" ne povas esti la subjekto, kaj, kun "sabato" kiel la subjekto, ni havus eraron pro neatento al la supra konsilo.

Jen la tri formoj: la sepan tagon estas sabato; sabato estas la sepan tagon; la sepa tago estas sabato. Kiu el ili estas por vi la plej gramatike klarigebla?

Unu amiko sugestas, ke mankas

prepozicio antaŭ "sepa tago", nome "dum" aŭ simila, kiu ellaso neprigas uzon de la akuzativo. "Dum la sepa tago estas sabato".

### KIOM MI PROFITUS EL ĜI?

"Homoj havas pli grandan intereson lerni lingvon, kiu donos al ili monan avantaĝon — pli bona scio pri la angla lingvo, ekzemple, eble promesas al ili promocion kaj kreskon de salajro; scio pri Esperanto eble helpas rilate al la unuigo de Eŭropo kaj aliaj landoj, sed ne helpas tiujn homojn rilate al iliaj panakiraj okupoj, kaj tial ili opinias, ke ne valoras la penon eluzi sian tempon super studo de nia lingvo.

"Bedaŭrinde tio enhavas veron en la nuna epoko. La homoj edukigis kredi, ke la plej valora agado estas gajni la vivrimedojn, eĉ se oni devas vendi la animon tiucele. Oni eĉ asertas, ke oni ne povas atingi la plej altajn postenojn, krom se oni estas preta ĉiam leki botlaĉojn kaj neniam esprimi sian sendependan, privatan opinion pri kio ajn. . . .

"Zamenhof estis unu el tiuj raraj homoj, kiuj 'aperas' de tempo al tempo, por doni al la mondo ion fundamente kaj grave necesan por la progresado de la teranoj, ne por ilia ĉiutaga vivrimeda vivo, sed por ilia spirita evoluo. Preskaŭ neniu Esperantisto, el la milmiloj, kiuj lernis kaj uzadis la lingvon, iam gajnis la vivrimedojn, aŭ pli altajn postenojn, pro ĝi — sed preskaŭ senescepte ĉiu, kiu fidelis al la lingvo, sentis sin pli grava kaj konstatis la spiritan benon, kiu estas parto de la interna ideo kaj konsisto de la lingvo, kiun neniu komitato de lingvaj fakuloj povus produkti."—Laŭ "Elingita Glavo" (Verdiro): eld: Stafeto.

### KIOM ESTAS LA SANCOJ?

Viro metis 331 pilolojn en botelon. Tricent enhavis bikarbonaton de sodo; tridek enhavis sendanĝeran drogon kontraŭ postebriaj efikoj. Sed unu enhavis cianidan kalion. Miksigis la piloloj kaj, sternite sur tablo, ĉiuj aspektis samaj.

"Kiom el vi kuraĝas preni ŝancon, glutante unu el tiuj piloloj?" li demandis. Neniu akceptis la alvokon.

"Nu, vi ne volas tiel agi", li daŭrigis. "Sed sciu, ke unu homo estas mortigita el 331 okazoj en kiuj aŭtisto penas riske rapidveturi trafiklumon pas-indikan".

### VOICE OF AMERICA Japanese Radio Program, Oct. 28.

Kiyotaro Deguchi and Yoshimi Umeda, of Kameoka, Japan, were interviewed about their trip round the world and their attendance at the 48th annual World Esperanto Congress in Sofia, at which met 3500 persons from 45 nations. Both of these delegates said that as all there spoke Esperanto there was no need for interpreters or translators. The number of Esperantists was especially large in England, the Netherlands, France, the Scandinavian countries and in some republics of South America. It is estimated that about 20 million know the language, of whom some 100,000 are in Japan, where there is increased interest in it because of the World Esperanto Congress to be held in Tokyo in 1965, and also because of the Olympics next year.

Esperanto literature includes translations of many books not available in other languages, including English and Japanese, though these are rather expensive because their circulation is limited.

Mr. Deguchi and Mr. Umeda are members of a religious movement called **Oomoto**, which uses Esperanto in its international contacts.

### AMIKA KRITIKO

Kevin Smith pri Bahasa Indonesia (p. 238): "La komento en la artikolo, ke Bahia Indonesia estas bazita sur la malaja lingvo, ne estas ĝusta; B.I. ja estas la malaja. Ĝi estas la malaja modernigita kaj ĝisdatigita por la celoj de nuntempa uzado tutampleksa.

"Estas miskomprenige diri, ke Esperanto estas bazita sur la latina; ĝi ne estas bazita sur iu ajn lingvo. Ĝi estas ido de la hindeŭropaj lingvoj de la moderna Eŭropo. Efektive, Esp-o enhavas sintaksajn kaj frazstrukturajn karakterizaĵojn disvolvigatajn el la latinidaj, germanidaj, slavidaj kaj greka lingvoj. Estas tiaj karakterizaĵoj — kaj ne nuraj vort-elementoj, kiuj montras la aŭtentikajn parencecojn inter tiuj lingvoj, kiuj havas "idojn", kaj tiuj, kiuj "ide" naskiĝas el ili.

"Malgraŭ ĉio supre, ekzistas ebloj por plej interesa komparo inter la morfologioj kaj sintaksoj de Esperanto kaj B.I."

## TRANSLATORS AND ESPERANTO

### Professional Prejudice Poses Ethical Problem.

Having considered our front article in No. 35, Mrs. L. Long, 55 Kingston Av., Mortlake, Concord, N.S.W., suggests that many interpreters are under the impression that Esperanto jeopardises their positions.

Those who have read the article in "Heroldo de Esperanto" (7/9) will incline to a belief that this may be so. It informs us that Mrs. Van Hoof, chief of the interpreting dept. of the European Economic Commission, says there is an acute lack of conference interpreters. Having given figures that indicate a 98 p.c. increase in demand for such since 1960, and stressed the difficulties in this regard confronting the institutions of the Common Market, she discusses the training of these professionals.

Accepted in principle, the candidate must exercise for two months without salary and thereafter become an apprentice for a further four months. He then, if successful, is engaged, at a commencing salary of 300 dol. a month. He could then go on to 600 dol.

Side by side with these, operate freelance interpreters who may earn up to 40 dol. a day. Courses at schools for interpreters run as a rule for four years.

We thus have the conditions that go to the forming of an exclusive elite, who, having served a long and gruelling probation, naturally centre on the prospect of enjoying their

hard-won isolation, or rather on the high profit such brings.

Similar opposition comes from such teachers of languages as cannot gain a wider perspective than that of their own immediate professional interests. There are, however, heartening exceptions in this area of education, as one may see by the pamphlet issued by the Universal Esperanto Assn.—"To All Students and Academic Staff"—over the signatures of fifty outstanding scholars.

These men know that Esperanto is designed to meet a world-felt need and to enable any and every man to communicate freely over the language bar. Their moral integrity enables them to place this recognition above what others would consider their paramount interest. The antipathy of this or that circle, if such is evidenced, is but one of the difficulties Esperantists have to meet, and if possible overcome, in the task of presenting to far wider social strata the solution to the age-old problem.

The confusion of language is stultifying and hurtful to human relations and widely recognised as such. The rightness of professional bodies in maintaining their existence by hindering those with the means of abolishing Babel's curse must be questioned—as indeed it would be were doctors similarly to take this attitude, fearing loss of occupation through a final conquest by science over disease.

### ĈENO DE L' REMEMORO

E. Kellett transvivis kelkajn jarojn la aperon de sia libro, "Laŭ Mia Memoro" (1936): en ĝi la maljuna aŭtoro menciis amikon, kiu klare rememoris pri la urbaj festlumigoj okaze de la Angla marbatala venko ĉe Capt. St. Vincent en 1797.

Kiam junulo Kellett aŭdis pri maljunulino, kiu, en 1884, parolis al viro pri Oliver Cromwell. Li diris: "Neniam mi povis klare formi al mi opinion pri li." La ino respondis: "Ĉu vere? La unua edzo de la unua edzino de mia edzo konis lin bone, kaj lin tre estimis". Kellett rimarkas, ke, post konsiderado, oni trovus, ke tiu situacio estas "streĉe" okazbla.

Kiam en 1912 oni celebris la centjaron de la Moskva incendio, dudekelke da homoj pretendis, ke ili vidis la urbegobrunon. Povas esti, ke efektive du rajte pretendis.

Hilaire Belloc (1870-1953), kiam knabo, vizitis la tre profundagan Fraŭlinon Montgolfier, la flinon de la balonisto (1740-1810). Si diris al li, ke ŝi vidis la kanajlaron iranta tra Parizo, por ataki la Bastilon. Belloc komentis, ke li esperas povi rakonti tion al siaj nepoj, kiam ankaŭ li fariĝos ekstreme aĝhava.

Melburna Esp-istino, F-ino B. Blyth (1849-1948), rememoris vidi la celebren en la Valo de Derwent (Tasmanio) okaze de la falo de Sebastopol en 1854.

George Borrow (1803-1881) konis viron, kiu partoprenis kun Admiralo Bligh (blaj) la ŝipribelon en 1789. La viro mortis ĉ. 1822. (ĉap. 5, apendico "The Romany Rye"). Tiu informis al Borrow pri la bona karaktero de Bligh. Tial ni havas ĝis nia tempo preskau "freŝan" ateston pri tio, ĉar certe ĝis 1913 ankoraŭ vivis homoj, kiuj parolis al Borrow — viro ricevinta la ateston rekte de la maristo mem.—F.R.B.

### BELARTA KONKURSO

The Editor has full text of the nature and conditions of this annual U.E.A. enterprise, and would send copy to those interested. Original or translated poetry; original prose; original playlet. It is open to any U.E.A. individual member. Entries to reach Mr. Wm. Auld, 20 Harviestoun Rd., Alloa, Clacks, Scotland, by May 31 next.

### LA REFLEKSIVO

Ĝi estas la plej malfacila elemento en Esperanto. Studinte la Raporton de Lippman kaj "Personaj Pronomoj" (Ossaka), oni konstato, ke verdire ne ekzistas ĝenerale agnoskitaj reguloj pri ĝia uzado. Oni povas citi multajn kontraŭdirajn en si uzadojn en la literaturo, eĉ en la Zam-aj verkoj.

Skribis Grabowski ("Lingvo Internacia" 1909/365): "Se . . . plej bonaj verkistoj iafaje ne sekvas la regulon (?—Red.), ili aŭ faras eraron, aŭ ili penas atingi ankoraŭ pli altan gradon de klareco, kiu estas la plej supera regulo de nia lingvo, ĉar ankaŭ la uzado de 'sia' estis enkondukita en Esperanton nur pro tiu motivo de klareco". Jes, antaŭ ĉio — la klareco!

### LA MONDCIVITANOJ

La Internacia Registro de la Mondcivitanoj eldonas oklingve kaj en E-o la karton de mondĉivitano, kaj esperas trovi kvalifikitajn tradukantojn inter la E-istoj. Tiu reto de Esperanta tradukado estis starigita frue en 1963 kaj renkontis favoran akcepton. Detalojn ĉe I.R.M.C., 55 rue Lacedepede, Paris 5.

### KORESPONDADO

Deziras korespondantojn en Aŭstralio Docento Viktor Gruško, USSR, Rostov-Don 38, Prospekt Lenina 95, kv. 53.

23-jara lernanto volas leteramikojn en Aŭstralio, pri kiu li vidis filmon kaj nun legas librojn. Herbert Sauter, Olgastrasse 141/1, Stuttgart, Germany.

Franca sciencisto pri la Nordatlantika Alianco: "Ĝi similas elefantojn sin amantajn. Ĉio iras je tre alta nivelo; ili kreas multe da polvo. Sed oni devas atendi jarojn por ricevi rezulton".

Antaŭ ol pruntepeti monon de amiko, decidu pri tio: kiun vi pli multe bezonas: amikon aŭ monon.

Malfacile hodiaŭ gejunuloj komprenas la menson de la natura filozofio Thoreau (toru), kiu vivloĝis apud lageto sed ne posedis akvoskiojn aŭ subakvan aertubon.

Antaŭ dek jaroj la luno estis inspiro al amantoj kaj poetoj. Post dek jaroj ĝi estos nur ankoraŭ unu flughaveno.

Ho se ni havus du vivojn! Unu dum kiu ni farus niajn erarojn, ŝajne neeviteblajn por la homoj; kaj duan dum kiu ni povus profiti per ili.—D. H. Lawrence.

En ĉiuj lingvoj efikas du ĉefaj leĝoj: Leĝo de analogio kaj leĝo de minimuma peno.

### IMPORTANT NOTICE

ALL members of the U.E.A. under 25 years old are entitled to receive free the attractive new review, "KONTAKTO", designed for youth and issued quarterly.

Would those concerned please forward their birth date to Mr. Ken Linton, 11 Poplar St., South Caulfield,